Revuo de Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Societo Kebekia
2023: 3-4 | ISSN: 0827-3154

Lumo

Unua ZEO en Montrealo

KEA: prezidanta raporto 2023

Geoffrey Greatrex, Prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio

Post la epopea kongresa jaro 2022, la nuna montriĝis pli trankvila. KEA tamen daŭrigis siajn virtualajn renkontiĝojn, KVaK-ojn, kiuj okazas normale nun printempe kaj aŭtune. Ĉeestas 40-50 homoj normale, plejparte kanadanoj. Sed en la plej lasta – mi verkas antaŭ la novembra – kongreseto oni atendas pli grandan ĉeestantaron pro intereso de brazilaj samideanoj.

Estraranoj, aparte Ĵenja Amis, aktivas diversmaniere: Ĵenja ne nur redaktas nian *Lumo*n, sed ankaŭ okupiĝas pri aliaj projektoj, aparte pri pretigo kaj eventuala eldonigo de taglibroj de eminenta montreala historiisto Henri Ellenberger (legu la artikolon pli poste en ĉi tiu numero).

Geoffrey Greatrex partoprenis la ĉi-jaran UK-on en Torino, sed li eksiĝos kiel prezidanto pro tio, ke li pasigos plurajn monatojn de 2024-25 en Britio kaj aliloke dum esplora jaro, sed li daŭre estos estrarano; lin anstataŭos Garry Evans, pli bone konata al multaj samideanoj kiel la fama S-ro Mann en la bela dramo, kiun oni prezentis en Montrealo. Li jam aktivas en ESK kaj ludis kernan rolon en la LKK de la montreala UK. Elizabeth Holden, kiu fidele okupiĝis pri niaj sociaj retaj paĝoj, ankaŭ demisias, same kiel nia antaŭa prezidanto Paul Hopkins.

Kiel tuj konstateblas, okazas sufiĉe grandaj ŝanĝoj en la estraro de via (nia) asocio. Ni bonvenigas al la estraro Jordan Zero, kiu jam nin helpas pri niaj retejo kaj partoprenis kelkajn estrarkunsidojn, kaj ankaŭ Luis Obando, kiu loĝas nun en Toronto kaj havas grandan movadan sperton.

Ni ĝojas, ke aliaj estraranoj, kiel Ĵenja, Andrew Sly, Trefleo Mercier kaj, plej grave, nia efika kaj fidela sekretario, Bob Williamson, daŭrigos sian laboron, same Raymond Brisebois, kiu jam kasistas dek jarojn – sed li esperas povi ĝin transdoni al iu alia

post ne tro longe. Kiel kutime, do, ni daŭre serĉas novajn aktivulojn kaj estraranojn…

Mi kaptu la okazon do kuraĝigi niajn legantojn aktiviĝi en la asocio. Ni ne certas, kiel funkcios nia revuo, *Lumo*, estontece: estas peza ŝarĝo por Ĵenja, kiu fariĝis pli peza lastatempe. La estraro emus maldikigi la revuon kaj aperigi ĝin pli ofte. Ne necesas, ke unu sola persono respondecu pri ĝi. Pluraj modeloj povus funkcii, ekz. se iu dezirus redakti (nur) printempan numeron.

Pri varbaj sesioj en la interreto la estraro ja diskutis; mi menciis ilin en mia lasta raporto. Ni konstatis, ke jam oni proponas lingvajn kursojn pri Esperanto en la angla (ekz., de la londona klubo, Britio). Ili okazas virtuale sed vive; ne temas pri registritaj sesioj. En la franca io tia ekzistas, ŝajne, sed nur je progresa nivelo (ĉe la pariza klubo). Dezirindas okazigo de varba kunveno – sed kiel ĝin pretigi? Kiun varbi? Andy Blair afable sendis ideojn pri ĝi, sed mankas homfortoj, almenaŭ por la momento, por serioze pretigi la vojon.

Finfine mi danku la samideanojn pro ilia laboro (ne nepre en la nacia asocio, ĉar pluraj movade aktivas en aliaj kampoj, mi bone scias). Mi deziras al ĉiuj belan novan jaron.



Martin Morris, la bibliotekisto de KEA kaj ESK, vastigis la kolekton kaj zorgis pri niaj arkivoj

Ĵenja Amis, estrarano de KEA, prelegis en februaro 2023 en la Historia Societo de Beaconsfield pri Montrealaj Zamenhofoj

ESK: prezidanta raporto 2022-2023

Nicolas Viau, Prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia

La jaro 2022–2023 estis la unua postpandemia kaj postkongresa jaro en Montrealo. Kompreneble dum tiu jaro necesis rekolekti fortojn kaj reveni al la “normala vivo”.

Ni tamen sukcesis atingi, danke al streboj de nia aktivularo, plurajn aferojn:



- Ni eksciis, danke al Irène Ellenberger, pri la taglibroj de Henri Ellenberger, svisdevena psikiatro kaj historiisto de psikatria scienco, kiu pasigis duonon de sia vivo en Montrealo, kaj kiu dum jardekoj verkis 41 taglibrojn en Esperanto. Tio povus esti la komenco de tre grava historia projekto por esperantistoj en Kebekio, la cetero de Kanado kaj tutmonde. Pluraj aktivuloj jam subtenas la projekton (dankon interalie al Ĵenja Amis, Gabriel Labrie, sed ankaŭ al Trefleo Mercier kaj Merle Haltrecht-Matte pro la helpo!).

- Ni okazigis belan Zamenhofan feston en decembro, en Montrealo. Multaj ĉeestis!

- Aperis tre bela raporto de la revuo Urbania pri la Esperanto-komunumo de Montrealo (majo 2023): https://urbania.ca/article/une-biere-avec-la-communaute-esperanto-de-montrealo

- Kunigo de fortoj kun KEA pri la revuo “Lumo”, tiel ke oni povu daŭre havi asocian revuon. Ni ŝuldas multon al Ĵenja, kiu daŭre akceptas redakti la revuon, samkiel ŝi faris por ESK dum 10 jaroj. Iusence, “Lumo”, kiu estas la heredanto de “La Lumo”, fondita en Montrealo, revenis hejmen!

- Ni okazigis Paralelan Universon en Montrealo.

- Tamara Koziej ankaŭ okazigis informan tablon pri Esperanto en Sageneo. Gratulon al ŝi!

- Inaŭguriĝis memortabulo pri Albert Saint-Martin en la montreala parko Albert-Saint-Martin, danke al la iniciato, obstina laboro (aparte por obteni permeson de la urbo) kaj malavara donaco de Normando Fleury. Ĝi estas ankaŭ la unua vera ZEO en Montrealo! La inaŭguro estis bela evento okazinta la 8-an de septembro 2023, kaj CTV

tiuokaze eĉ raportis pri Esperanto (legu pli pri tio pli poste en *Lumo*).

Aliaj kontribuoj

Estis ankaŭ rimarkindaj kontribuoj de Kebekianoj en Torino: ekzemple la prelegoj de Gabriel Labrie pri lingvaj pejzaĝoj.
Ni ne forgesu, ke INK (la Interkultura Novelo-Konkurso), kiu estiĝis en Kebekio, nun havas "propran vivon" kaj plu grandiĝas, post aperigo de dua novelaro, kiu jam estas en sia tria eldono.
Se paroli pri flankaj aktivaĵoj ne nepre en Esperanto, sed kiuj rilatas al Esperanto en Kebekio, Ĵenja faris belan prelegon pri la Montrealaj Zamenhofoj antaŭ la Historia Societo de Beaconsfield (ĝi estis tre sukcesa!). Tio informis la publikon ankaŭ pri Esperanto.
Ni ankaŭ estu dankemaj al Rogener Pavinski pro la aperigo de tre bela filmeto pri la UK-2022 komence de 2023 kaj al Alex Miller pro la filmo "1910". Ambaŭ tre utilas kaj plu utilos por reliefigi la gravajn kontribuojn al Esperanto fare de Kebekianoj kaj de niaj partneroj en la cetero de Kanado kaj ĉie. Dankon ankaŭ al la revuo Esperanto, kiu aperigis 1910 kovrile en januaro 2023.

Plu funkciis nia komuna biblioteka servo (kun KEA) danke al Martin Morris!

Pluraj aliaj projektoj estiĝis, ideoj ne mankas, ni vidu, ĉu ili realigeblos! Ekzemple:

- Tempokapsulo: danke al la streboj de Ĵenja, pluraj objektoj jam estis kolektitaj, sed la ĉefa partnero, la anglikana katedralo Christ Church en Montrealo, kiu devis uzi la sama ujon, kaj grave, la saman lokon (la katedralon mem) decidis nuligi sian partoprenon pro manko de intereso flanke de sia komunumo. Oni nun pripensas eblajn postajn paŝojn.

- Arkiviga projekto pri la UK (kun KEA kaj aliaj partneroj, kiel la Esperanto-kolekto de la Nacia Biblioteko de Aŭstrio en Vieno).

- Ĝisdatigo de la libro pri la historio de ESK. 2022 estis tro plena jaro por vere lanĉi la projekton, sed ja okazis multegaj aferoj ekde 2012 (30 jaroj de ESK). Ja ankaŭ pluraj eroj de la historio de Esperanto en Kebekio malkovriĝis dum la pasintaj kelkaj jaroj.

Estraro de ESK

Finiĝas ankaŭ deĵorperiodo de la estraro. Mi elkore dankegas al la aliaj estraranoj pro ilia zorga laboro!

Por la venonta estrarperiodo, mi ŝatus instigi ĉiujn proponi sin por fariĝi parto de la estraro. Estus belege havi pli da junuloj, virinoj kaj aktivuloj ekster la Montreala regiono en la estraro.

Dankon al ĉiuj kaj ek al nova jaro!

Novaj estraranoj de Kanada Esperanto-Asocio

Luis Obando

Luis Obando naskiĝis la 21-an de decembro 1995 en Kolombio, studis merkatikon kaj negocojn en Kolombio, kaj magistriĝis pri administrado de negocoj ĉe usona universitato. Li parolas flue la italan, la anglan, la hispanan (denaske) kaj Esperanton, krome li havas iomajn nivelojn pri la KSL (Kolombia signolingvo), la germana, la gvarania kaj Tokipono.

Li eklernis Esperanton en 2018. Li estas dumviva membro de UEA, financa kunlaboranto de UEA, kunlaboranto de ESF kaj KEL, eksestrarano de TEJO, kunlaborinto de i.a. Ekparolu, Vikipedio, Tutmondaj Voĉoj, kaj nun nova estrarano de KEA.
Li kunkreis la esperantan kurson por hispanparolantoj kiu ricevis pli ol 2400 lernantojn el pli ol 38 landoj de 2020 al 2023. La kurso okazas ĉiujare de aŭgusto al novembro per etgrupaj videoalvokoj. Luis ĉiam ŝatis Kanadon, kaj malgraŭ ke li loĝis en diversaj landoj, ĉiam volis loĝi en Kanado, en 2022 finfine li translokiĝis al Toronto kaj ekaktiviĝis loke kaj nacie.

Jordan Zero

Mia nomo estas Jordan (aŭ Ĝordano) kaj mi havas 28 jarojn. Mi naskiĝis en Mississauga, mi translokiĝis al Montrealo studi ĉe universitato, sed nun loĝas en Barrie, Ontario.

Mi malkovris Esperanton en 2015, kiam ĝi aperis sur Duolingo, sed komencis lerni ĝin en 2020. Mi tuj enamiĝis al la lingvo kaj nur post kelkaj semajnoj mi povis ĉeesti mian unuan Kanadan Virtualan Kongreson!

Mi studis muzikon (mia ĉefa instrumento estas la trumpeto) kaj edukadon, kaj nun laboras kiel instruisto. De tempo al tempo mi ludas muzikon profesie. Pasintece mi ludis kun kelkaj Kanadaj klasikaj kaj ĵazaj orkestroj.

Krom Esperanto, miaj ŝatokupoj inkluzivas programadon kaj teknologion. Mi estas neaktiva membro de Creative Commons por Instruistoj kaj la komunumo IndieWeb.

Novaj estraranoj de Esperanto-Societo Kebekia

Gabriel Labrie

Naskiĝinta en Montrealo, mi estas doktoriĝanto en la Sekcio de ĝermanaj studoj de la Universitato de Montrealo. Mia disertaĵo temas pri plurlingveco en Luksemburgo kaj ĝiaj efikoj sur lingvopreferojn kaj lingvouzon. Pro mia ĝenerala intereso pri lingvoj, mi parolas krom la francan kaj Esperanton, la germanan, la katalunan, la luksemburgan kaj la svedan – kaj mi lernas nuntempe ĉefe la polan kaj la portugalan. Mi interesiĝas ankaŭ pri aliaj temaroj, kiel ekzemple politiko, historio, kulturo ktp.

Eveline Ménard

Mi nomiĝas Eveline kaj mi estas rakontistino kaj muzikistino. Mi rakontas rakontojn dum pli ol 20 jaroj. Min inspiras rakontoj de buŝa tradicio, kiujn mi prilaboras por "nuntempigi" ilin. En la lastaj jaroj, mi realigis multnombrajn projektojn de kultura perado kun junuloj kaj maljunuloj ĉirkaŭ fabeloj kaj buŝa tradicio.

Mi malkovris Esperanton per vojaĝo, kiam mi estis juna kaj jen mi denove partoprenas en Esperanta aktiveco dum lastaj du jaroj.

Zdravka Metz havis la honoron saluti nome de Ameriko dum la Kvara Virtuala Kongreso de Esperanto (novembro 2023). Ni fieras!



Unua ZEO* en Montrealo

Normando Fleury, prezidinto de LKK por la 107-a UK en Montrealo (2022)

Ekde la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987, ni provas havi ZEO-n en Montrealo. Ni proponis diversajn parkojn kaj stratojn. La toponimia instanco montreala foje indikis, ke ili aldonis la nomon Esperanto en la nombanko, por eventuala uzo. Poste ili informis nin, ke ili ne intencas uzi tiun nomon ĉar ĝi ne sufiĉe rilatas al la historio de la urbo. Ni refoje petis kun pli detala dosiero. Sed vane, ĉiam estis negativa respondo.

Esplorante pri la pioniroj de la movado en Kebekio kaj Kanado, cele la nomadon de salonoj por la 107-a UK, mi aparte interesiĝis pri la vivo de Albert Saint-Martin. Estas parko kaj ekstera murbildo je lia honoro en Montrealo. Nu, li gravas en la historio de Montrealo kaj li estis pioniro en la Esperanto-movado. Kial ne ligi la du cirkonstancojn? Mi eksciis, ke estas biografia libro pri li kaj tuj mendis ĝin. Mi malkovris ke Saint-Martin dediĉis sian vivon al disvastigo de Esperanto, iris al la unua UK en Bulonjo-ĉe-maro, fondis Esperanto-revuon *La Lumo*, la unuan Esperanto-klubon en Kanado – kaj Kebekio – kaj multe pli.

Okaze de la UK montreala, mi proponis al la urbaj instancoj honorigon de unu el la pioniroj de Esperanto-Movado en Kanado, Albert Saint-Martin, per memortabulo. Estis longega procezo kaj fine ni sukcesis pasint-septembre publike malkovri la tabulon. Ni celis ke ĝi ne nur honorigu Saint-Martin, sed ankaŭ menciu la okazigon de la

Claude Larivière (maldekstre) kaj Normando Fleury rivelas la memortabulon

UK en Montrealo. Tion ni ne klare menciis al la urbestraro, sed ĝi estis nia sekreta kromcelo. Estis televida elsendo kaj longa reta artikolo pri la evento (legu ĝin poste en ĉi tiu numero). Ni fieras ke fine estas la unua ZEO en Montrealo.

*ZEO = Zamenhofa aŭ Esperanta Objekto

Unue aperis en revuo Esperanto, oktobro 2023, kun modifoj.

De la redakcio: La mono necesa por la memortabulo estis afable donacita de Normando Fleury, kiu ankaŭ faris ĉion necesan por instali la tabulon. La tabulo estis dezajnita de Ĵenja Amis.

Spektu la tutan ceremonion de la inaŭguro de la memortabulo en la Fejsbuka kanalo de ESK (klaku por spekti). La plena inaŭgura parolado estas en la artikolo sekvapaĝe.

Albert Saint-Martin

Albert Saint-Martin (1865-1947) estis unu el la plej aktivaj esperantaj disvastigantoj en Montrealo inter 1902 kaj 1947. Li prelegis, batalis por la lingvo de la komenco de la jarcento ĝis sia morto. Inter 1902 kaj 1904, li verkis multe kun Pierre Beauchemin en *La Lumo* sub la nomo A. Rembert. Historiisto Claude Larivière verkis la unununan libron pri Albert Saint-Martin, kiu liveris multajn historiajn detalojn ne nur pri la movado sed ankaŭ pri la laboristaj luktoj kaj ties rilatoj kun tiu ĉi fama socialista batalanto.

La du infanoj de Saint-Martin ludis rolon en la movado: la filo Théode sekretariis en la Klubo Progreso kaj la filino Berthe lernis Esperanton frue kaj estis la juna knabino kiu portas lampon disradiantan la mesaĝon “Pri, per, pro, por Esperanto” sur la kovrilo de la revuo *La Lumo*.



Omaĝo al Albert Saint-Martin

Verkita kaj legita de Normand Fleury dum la [inaŭguro de la memortabulo al Albert Saint-Martin](). Montrealo, la 8-an de septembro 2023

Mia teksto fontas precipe el la libro “Albert Saint-Martin, militant d’Avant-garde” de Claude Larivière, Éditions de la rue Dorion.

Ni volas hodiaŭ honorigi Albert Saint-Martin ĉar li plene meritas tion.

Krom esti inter la pioniroj en la kanada Esperanto-movado, li dediĉis 50 jarojn de sia vivo por helpi aliulojn, tiel estas, helpi simplajn aŭ, ni diru pli bone, ordinarajn laboristojn.

Saint-Martin iniciatis la manifestacion de la unua de majo 1906 en Montrealo, kiel laborista tago, fondis laboristan universitaton, kooperan societon kaj multe multe pli.

Sed hodiaŭ mi volas prezenti liajn agadojn por la disvastigo de Esperanto. Jam sur la 11-a paĝo de tiu ĉi vere interesa libro pri lia vivo la aŭtoro indikas: “La lingvo Esperanto ligos lin al sampensuloj kaj al la internacia movado socialista.”

Sur la paĝo 33 la aŭtoro indikas: “Saint-Martin malkovras Esperanton en 1894 danke al kolego, stenografo kiel li, Pierre Beauchemin. Saint-Martin funde lernos la lingvon kaj poste dum 50 jaroj fariĝos aktiva disvastiganto de Esperanto.”

Ekde 1902, Saint-Martin regule laboras en Saint-Hyacinthe, daŭre kiel stenografo. Li kunfondos ties literaturan rondon. Li instruos kompletan kurson de Esperanto ene de tiu ĉi rondo.

Samurbe, por iel pruvi la internaciecon de la lingvo, estis ekspoziciita en komerca

montrofenestro urbocentre, fama letero “La Rondiranto”: 10 futojn longa (trimetra), kun subskriboj de famuloj el grandaj urboj de la tuta mondo. La letero fine reiris al Bruselo, ĝia devena loko.

Esperanto rapide disvastiĝis en tiu epoko inter socialistaj laboristoj, ĉar ĝi ebligas komunikadon inter laboristoj en la tuta mondo. Esperanto havas alian aktivan adepton en St-Hyacinthe en tiu epoko: la pasto Solis el samloka seminario. Tio povus klarigi. kial aperis Esperanto-kroniko kun religiaj tekstoj en loka taga gazeto.

En 1905 Saint-Martin luprenas apudan domon al la sia en Montrealo. Tiu domo fariĝos la Esperanto-klubejo kaj la laborista klubo St-Jacques (81 strato St-Christophe, apud Ste-Catherine).

Dum la somero 1905 Saint-Martin ne aktivos en la laborista partio. Li ŝipe iros al Eŭropo. Li partoprenos Esperanto-kongreson en Bulonjo-ĉe-Maro kun sia patro, dua edzino de la patro, Théode et Berthe, du liaj infanoj kaj kolego Beauchemin.

Paralele al la Esperanto-klubo, kies celoj estas kulturaj kaj sociaj, Saint-Martin organizas socidemokratan klubon en aŭtuno 1905. Tiu lasta klubo celas politikajn agadojn.

Aŭtune 1906 Saint-Martin redaktas, financas kaj eldonas la revuon *La Lumo*. Li starigas kooperativon “Esperanto”.

Oktobre 1907 li starigas komunumon pere de kooperativo Esperanto. La kooperativo mastrumas du popularajn nutraĵ-vendejojn.

Sur la paĝo 167 la aŭtoro Larivière skribas, ke Saint-Martin ricevis vastan terenon en 1910, en la regiono de Mont-Laurier, pere de Gustave Testard kaj de Kooperativo Esperanto. Saint-Martin decidas fondi komunumon “La Kanado” en 1915, do komuna farmbieno. 20 homoj de Montrealo translokiĝas tien. Vivo malfacilas, ĉar ili ne scias, kiel kultivi la teron aŭ zorgi pri farmbestoj. La komunumo daŭros nur du jarojn. La bieno estos forvendita de la municipo plurjarojn poste pro nepagitaj impostoj.

Poste en la libro la aŭtoro ne plu aludas al la esperantistaj agadoj de Saint-Martin. Sed, certe, li plue uzis la lingvon. Fakte, Saint-Martin multe

Claude Larivière (maldekstre) kaj Normando Fleury

agadis politike, eĉ plurfoje kiel kandidato en la provincaj balotoj.

La aŭtoro aldonas, ke Saint-Martin travivis multajn malfacilaĵojn aparte pro sia engaĝigo defendi la laboristojn. Post lia morto, oni detruis liajn arkivojn kaj bibliotekon. Oni provis malaperigi liajn socialistajn agadojn.

Ni esperas, ke la aldono de tiu ĉi memortabulo, honore al pioniro de Esperanto en Kanado, kreos la unuan ZEO-n en Montrealo. (ZEO estas Zamenhofa aŭ Esperanta objekto.)

Mi dankas vian atenton kaj ĉeeston.

Normando Fleury, Prezidanto, Loka Kongresa Komitato, 107-a Universala Kongreso de Esperanto, Montrealo 2022

Claude Larivière: « Albert Saint-Martin, militant d'avant-garde »

Livre mythique introuvable, portrait d'un militant non moins mythique, voici enfin réédité cet essai biographique et historique, enrichi d'une préface réactualisée par l'auteur: Claude Larivière.

Claude Larivière fait revivre la riche personnalité d'Albert Saint-Martin, le p'tit gars de l'est de Montréal, adversaire infatigable du pouvoir ecclésial et du nationalisme, méfiant à l'égard des bolcheviques, antimilitariste et pacifiste, fervent défenseur de l'éducation populaire, propagandiste de l'esperanto, professeur auprès des ouvriers et des chômeurs, grand orateur du mouvement social et créateur de coopératives d'alimentation.

Claude Larivière est travailleur social et sociologue. Après avoir fondé les Éditions coopératives Albert Saint-Martin (en 1975), il a contribué à développer des équipes de travail interdisciplinaires en CLSC avant de retourner enseigner à l'École de service social de l'Université de Montréal où il dirigea jusqu'à sa retraite (2013) le programme d'administration sociale.



Hommage à Albert Saint-Martin

Écrit et lu par Normand Fleury lors de l'inauguration de la plaque commémorative à Albert Saint-Martin. Montréal, le 8 septembre 2023

Mon discours est principalement tiré de l'ouvrage de Claude Larivière, Albert Saint-Martin, militant d'Avant-garde aux Éditions de la rue Dorion.

Nous voulons aujourd'hui honorer Albert Saint-Martin parce qu'il le mérite vraiment.

Il est non seulement un des pionniers du mouvement espérantiste au Canada, mais également un défenseur des droits des travailleurs et des gens marginalisés, et ce durant plus de 50 ans.

Albert Saint-Martin a organisé la première manifestation du 1er mai à Montréal en 1906. Il a fondé l'université ouvrière, une coopérative et bien plus.

Aujourd'hui je vais vous présenter ses actions pour la diffusion de l'espéranto. Déjà à la page 11, l'auteur indique « L'espéranto le liera plutôt aux siens et au mouvement socialiste internationale. »

À la page 33, l'auteur indique : « C'est en ces années (1894-1895) qu'il aurait été sensibilisé à l'espéranto par son collègue et ami le sténographe Pierre Beauchemin. » Saint-Martin étudia à fond la langue internationale inventée par Zamenhof et en devint par la suite le principal propagateur au Québec durant près de cinquante ans.

En 1902, Saint-Martin travaille régulièrement à Saint-Hyacinthe comme sténographe. Je cite; 'Bouchard et son groupe fondèrent également le Cercle

littéraire de St-Hyacinthe, en 1902. Ce fut une autre occasion pour Albert Saint-Martin et son collègue Beauchemin, de s'adresser aux Maskoutains : « Saint-Martin donne un cours complet d'espéranto aux nombreux élèves qui se sont inscrits, parmi lesquels on compte plusieurs sommités de notre ville. »

« On exhibait dans la montre d'une de nos principales maisons de commerce la *Rondiranto*, la fameuse lettre…qui, rendue à sa dernière étape, avait accompli le tour du monde et portait la signature d'au moins un citoyen important de toutes les grandes villes du globe. Cette missive extraordinaire mesurait dix pieds de longueur et fut réexpédiée de Saint-Hyacinthe à son premier envoyeur, à Bruxelles. »

« L'espéranto est alors une langue très répandue dans les milieux ouvriers socialistes, car elle permet aux travailleurs de communiquer par-delà les barrières linguistiques et nationales. »

Tuj antaŭ la inaŭguro de la memortabulo

« L'espéranto aurait eu pour promoteur sur le continent américain, l'abbé Solis, du séminaire de Saint-Hyacinthe. C'est peut-être ce qui explique la publication dans un quotidien d'une chronique d'espéranto contenant des textes religieux. »

À Montréal, Saint-Martin loue la maison voisine de la sienne et en fait un local de réunion pour le Club Espéranto et le Club ouvrier Saint-Jacques (81 St-Christophe près de Ste-Catherine).

Durant l'été 1905, le parti interrompt ses activités. Il semble que c'est durant cette période que Saint-Martin en profitera pour se rendre, par bateau, en Europe. « …nous savons qu'en cette année, Saint-Martin se rend à un congrès d'espérantistes à Boulogne-sur-Mer, en compagnie de son père, de la femme de ce dernier, de Théode et de Berthe, ses deux enfants, et du sténographe Beauchemin, son ami et collègue. »

Parallèlement au Club Espéranto dont les

objectifs sont culturels et sociaux, il organise un Club social-démocrate, à l'automne 1905.

À l'automne de 1906, organisation d'une imprimerie à son domicile…et publication en espéranto, de la revue *La Lumo*. Fondation de la Coopérative Espéranto.

Octobre 1907, vie en commune. La Coop opère deux épiceries populaires.

« Voyant qu'il ne pourrait guère obtenir quoi que ce soit des autorités municipales, Saint-Martin pense à mettre en exploitation les terres obtenues en 1910 par Gustave Testard et la Coopérative Espéranto près de Mont-Laurier. « … une ferme collective et communautaire, La Kanado, est ensuite édifiée en 1915 sur un lot. Une 20e de personnes y vivent, en majorité d'anciens citadins de Montréal… Les débuts sont difficiles parce que bien peu d'entre eux s'y connaissent en élevage et agriculture. La commune cessera ses activités en 1917… »

Par la suite, l'auteur n'aborde plus les actions pour l'espéranto de Saint-Martin. Il n'y a pas de doute qu'il est resté fidèle aux idéaux espérantistes. En fait Saint-Martin est très actif en politique provinciale, ce qui prend beaucoup de son temps.

L'auteur indique que Saint-Martin a vécu de nombreux moments très difficiles et même de la répression au cours de sa vie. Après sa mort, ses archives furent détruites.

Nous espérons que l'humble hommage que nous lui rendons par cette plaque, permettra de créer le premier ZEO* à Montréal et le fera ainsi mieux connaitre de la communauté espérantophone mondiale.

Merci de votre présence.

Normand Fleury
Président, Comité organisationnel du congrès 107-e Congrès mondial d'espéranto, Montréal 2022

Tuj post la inaŭguro okazis festeto en Resto-Végo

Novaj filmoj: rekomendoj de la redakcio

Filmo pri la UK en Torino de So Jinsu

Se vi ĉeestis, plonĝu en memorojn. Se vi ne ĉeestis, vidu, kia ĝi estis, la UK en Torino!

Filmetoj pri TAKE-2023

“Tio ĉi estas kafo”! Spektu amuzegajn ĉarmajn filmetojn de Alekso Miller pri la TAKE-2023

Usona Bona Film-Festivalo

Kvindeko da mallongaj filmetoj — amuzaj, pensigaj, etosaj. Trovu filmeton el Kanado!

ReKVaKo, kun gasto el 1941!

Por tiuj, kiuj maltrafis la 6-an KVaKo-n kaj tiuj, kiuj ŝatis ĝin tiom multe, ke oni volas re-spekti!

Esperanto en SK: la grupo de unu aktivas!

Bruce Arthur

Mi ĝojas ke KEA rekomencis eldoni sian revuon Lumo, kie la membroj povas legi, kion faras la asocio. Kaj la lokaj rondoj povas interŝanĝi informojn. Dum kelkaj jaroj, Lumo ne aperis, do mi sendis raportojn pri Esperanto-Rondo de Reĝino rekte al kelkaj Esperanto-rondoj en aliaj Kanadaj urboj. Sed ĉi-jare mi povas verki raporton por Lumo.

Tamen, Esperanto-Rondo de Reĝino ne plu funkcias. Ni havis tri membrojn, sed en 2020 du membroj translokiĝis el urbo Reĝino. Malgraŭ tio, mi povas raporti iom.

En decembro 2022, mi surpriziĝis ricevi du skatolojn de libroj en Esperanto de Wally du Temple de Brita Kolumbio.

CBC | MENU

NEWS Top Stories Local Climate World Canada Politics Indigenous

Saskatchewan

Regina home to smallest Esperanto language club in Canada

Esperanto has attracted millions of speakers worldwide including 2 in Regina

Nichole Huck · CBC News · Posted: May 01, 2016 2:00 PM EDT | Last Updated: May 1, 2016

En 2017, CBC Saskaĉevano raportis pri la klubo de Reĝino

Dum la sekvaj monatoj, mi tralegis ilin. La libroj estis interesaj kaj tre diversaj. Pli grave, ili povus servi al aliaj membroj de nia rondo. Sed kiel mi povus allogi aŭ trovi novajn membrojn?

En 2023, mi pendigis afiŝojn en la parko kaj ĉe la universitato, sed ŝajne sen rezulto. Mi ankaŭ skribis leterojn al kelkaj asocioj en la urbo. La Bahaa Komunumo diris, ke ili donis informojn al siaj membroj, sed ne estis alia rezulto de ili. La aliaj asocioj ne reagis.

Ĉi-jare mi re-aliĝis al KEA. Tiel mia nomo aperas en ties membrolisto, do se iu en Reĝino interesiĝos pri nia lingvo, tiu povos trovi min. KEA ne havas aliajn membrojn en la urbo, aŭ eĉ en la tuta provinco

Saskaĉevano. Estis membro en Saskatuno en 2022, sed ŝi ne re-aliĝis. Ŝi ne respondis al mesaĝo de mi.

Andy Blair de Halifakso organizis rekontiĝojn per Zoom por la prerioj. Mi dankas al li pro lia laboro. Mi kelkfoje partoprenis, kvankam la teknologio estas malfacila al mi. Sed mi pensas ke li ne sukcesis allogi aliajn partoprenantojn de Saskaĉevano ĉi-jare.

Mi mem verkas malgrandan novaĵleteron (*La Tersciuro*), kiun mi dissendas per retpoŝto proksimune unufoje monate. Teorie, mi povus uzi ĝin por interŝanĝi informojn inter Esperantistoj en la provinco, sed mi konas neniun, kiu volas legi ĝin. Sed kelkaj samideanoj ekster Saskaĉevano interesiĝas legi ĝin. Mi pensas ke ĝi ankaŭ helpas min esti pli bone organizita.

Mi ĝuas uzi Esperanton. Mi legis librojn kaj revuojn, kaj mi ankaŭ legis kaj aŭskultis iom ĉe la interreto. Mi korespondis kun iu en Demokratia Respubliko Kongo. Kaj mi pensas, ke Esperanto estas bona ideo, ĉar per ĝi homoj povus komuniki pli facile kaj pli juste. Mia urbo Reĝino havas pli ol 225 000 loĝantojn. Ĉu unu el ili volus helpi restarigi Esperanto-rondon? Mi pensas, ke tio estas atingebla espero.

Edward Napier est décédé

Marguerite Bilodeau

Notre Edward est décédé paisiblement le 26 novembre à 12h30, à 93 ans. On se connait depuis plus de 30 ans, comme des ardents activistes pour la paix, amoureux de la musique, du plein air et joueurs de scrabble. Fils adopté, de racine anglophone avec un baccalauréat en histoire, à vingt ans devenu végétarien, il a décide d'apprendre le français et plus tard l'espéranto qui fut pour lui l'ultime langue de pour tous les peuples.

Interkultura Novelo-Konkurso (INK): 4-a eldono

Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj *Homo sapiens*

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) alvenas kun nova temo: Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj *Homo sapiens*. La kvara eldono de la konkurso estis lanĉita dum la oktobra Retoso kaj estas rezulto de daŭra kunlaboro kun la Akademio Literatura de Esperanto (ALE), Bobelarto kaj aldone aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj per la eblo konkursi en ses diversaj lingvoj: krom Esperanto, eblas konkursi en la itala, la kataluna, la persa, la rusa kaj la ukraina. Tradukaĵoj el aliaj lingvoj daŭre bonvenas.



Eblas gajni en la du kategorioj de komencantaj kaj spertaj verkistoj entute dek monpremiojn kun la suma valoro 4500 eŭroj. La prezidanto de la konkurso estas irana esperantisto Ahmad Mamduhi, kiu estas ankaŭ prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

Noveloj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. **La teksto-proponoj devas havi maksimume 2000 vortojn** (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longo. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado, ties uzon oni devas mencii en la sendoformularo. Konkursi eblas per du noveloj.

La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 110-a Universala Kongreso de UEA en 2025. En la komencanta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 500, 400, 300, 200 kaj 100 eŭroj, respektive. En la sperta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos

premiojn de 1000, 800, 600, 400 kaj 200 eŭroj, respektive.

La limdato por konkursi estas la 30-a de junio 2024.

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe: bobelarto.ink/konkurso.

Kadre de la tria eldono, kies temo estis *La sekreta vivo de miaj najbaroj*, la Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 1331 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 48 landoj. La gajnintoj estos anoncitaj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 109-a UK, okazonta en Aruŝo, Tanzanio (3 aŭgusto-10 aŭgusto 2024). Por aliĝi al la kongreso, vizitu: uea.org/kongresoj/alighilo.

La du novel-rikoltoj de la antaŭaj eldonoj de la konkurso estas aĉeteblaj en la Libroservo de UEA (*Amo, tuso kaj forpaso* katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=669 kaj *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj* katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=233), ankaŭ ĉe eldonejo KAVA-PECH (Amo, tuso kaj forpaso kaj La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj).

Libroj el Kanado!

Vizitu la retejon de ESK por trovi kelkajn literaturajn trezorojn el Kanado. Perfekta por donaco je tiu bela tempo de festoj!

- *Maria Chapdelaine* – Louis Hémon $14
- *Kristnaskaj Rakontoj el Franca* Kanado — Louis Fréchette $23
- Birdoj En Nia Korto — Zdravka Metz $30
- Nanatasis — Robert Dutil $15
- Besta Verbaro — Normand Fleury $15
- Georgo Eklernas Esperanton — John Huang $20 (YouTube-video de la libro, bele legita de pluraj esperantistoj ĉi tie)
- Bela Joe — Margaret Marshall Saunders $25
- Kanada Verkaro — Wally du Temple $30 por molkovrila eldono



Henri Ellenberger kronikis sian vivon Esperante

Ĵenja Amis

La mondfama historiisto de medicino kaj krimologo Henri Ellenberger dum jaroj verkis taglibrojn grandparte en Esperanto. Entute la taglibroj ampleksas 41 volumojn, 12 000 paĝojn. Li naskiĝis en Afriko kiel filo de misiistoj. Dum la dua mondmilito fuĝis el okupita Francio al Svisio, kaj poste migris al Ameriko. La Montreala esperantisto Ĵenja Amis legis la unuan volumon, kiu temas pri liaj eskapo kaj vivo dum la dua mondmilito.



Estas septembro 2023 kaj ni troviĝas en Montrealo, en la salono de Irène Ellenberger, ĉirkaŭitaj de pentraĵoj en kvanto inda por eta arta galerio (Irène estas specialisto pri arto). Nin akompanas kelkaj montrealaj esperantistoj, Irène, kaj vizitanto el Eŭropo, d-ro Emmanuel Delille: historiisto de medicino, sed ofta en Kanado, ĉar li estas gast-preleganto en la Universitato de Saskaĉevano.

La celo de nia kuniĝo estas la esploroj pri la patro de Irène – Henri Ellenberger, svis-kanada psikiatro, sciencisto, etnografo, krimologo, verkisto, por nomi nur kelkajn el la "ĉapeloj" de la multfaceta figuro de Henri Ellenberger (1905–1993). Emmanuel estas la sola neesperantisto inter ni, do ni parolas france (afero iom nekutima por ni, esperantistoj).

Krom la biografo de Henri Ellenberger (d-rino Andrée Yanacopoulo), kaj lia filino Irène, Emmanuel Delille estas tiu, kiu plej konas tiun ĉi fascinan homon. Ni revenos al la salono de Irène je la fino, sed nun mi rakontu al vi ĉion laŭvice, ĉar mi povas legi la demandon, kiu brulas en viaj kapoj: kiel do ĉio ĉi rilatas al Esperanto?

Ni konatiĝis kun Irène Ellenberger en novembro 2022, kiam ŝi venis al unu el niaj monataj Montrealaj Esperanto-kunvenoj. Ŝi estis komencanto tiam, kaj ŝi nun jam tute flue legas

kaj bone komprenas Esperanton. Irène alportis al la kunveno taglibron de sia patro, d-ro Henri Ellenberger, de la jaroj 1940 ĝis 1943. Estas malgranda nigra kajero, kun densaj, senmarĝenaj skribaĵoj, preskaŭ tute nete, verkita preskaŭ tute en Esperanto!

Ni estis fascinitaj – kia valorega historia dokumento, el Eŭropo de la tempo de la Dua Mondmilito! Kompreneble, ni tuj guglis "Henri Ellenberger" kaj eksciis, ke temas pri granda pensulo de la 20-a jarcento, pri kiu temas Vikipedia artikolo en dek unu lingvoj (intertempe aldoniĝis Esperanto). Interalie, li verkis unu el fundamentaj libroj pri la historio de psikiatrio. Kelkaj el liaj libroj aperis eĉ postmorte – la lasta tute freŝe, en 2021, dank' al la laboro de nia jam konata d-ro Delille.



Kiam Irène diris, ke estas 40 pliaj libroj, mi pensis, ke eble mi misaŭdis, sed ne! Ekzistas entute kvardek unu libroj, ĉiu el ili kun ĉ. 270–300 paĝoj (do, ĉ. 12 mil paĝoj entute). La taglibroj kovras la tempon de 1940 ĝis la 1970-aj jaroj. Do, temas ne nur pri valorega historia dokumento el la tempo de la Dua Mondmilito, sed pri vere enorma korpuso. Por ni, esperantistoj, ĝi havas apartan valoron: ja temas pri gravega dokumento de tutmonda historia signifo, verkita en Esperanto, de internacie rekonita specialisto.

Kaj kiel okazis, ke la taglibroj vidas la lumon nur nun, tridek jarojn post la morto de la verkinto? Unue, ĉar, laŭ la instrukcio de Henri Ellenberger, la taglibroj estis sub embargo, kiu daŭris dek jarojn ekde lia morto aŭ la morto de lia edzino, kiu ajn okazos pli malfrue. Do, la intimaj ĵurnaloj ne estis deponitaj kaj katalogitaj kun la ceteraj dokumentoj, kiuj iris al arkivoj.

Liaj arkivindaj postlasaĵoj, fakte, troviĝas en du lokoj: la personaj dokumentoj (ekzemple, persona korespondado) estas ĉe la arkivo de la Evangelia Misiista Societo en Parizo, kune kun la ceteraj dokumentoj de lia familio (ĉar li venas el konata svis-franca misiista familio de intelektuloj – mi parolos pri lia familio poste), dum liaj fakaj arkivoj (artikoloj, fakaj taglibroj, faka korespondado, ktp.) troviĝas en la Centro de Dokumentado Henri Ellenberger ĉe la

Irène Ellenberger estas dua dekstre, 2022

Henri Ellenberger kaj Irène, 1949 (proks.)

Hospitalo Ste-Anne en Parizo (lia alma mater) – france, Centre de documentation Henri Ellenberger, Bibliothèque médicale Henri Ey, CHS Sainte-Anne.

Do, tiuj ĉi intimaj taglibroj en Esperanto “dormis” en la persona sekurstokejo de unu el liaj antaŭaj kolegoj (d-ro Élisabeth Roudinesco – historiisto, psikanalizisto kaj kunkreinto de la Centro de Esplorado kaj Dokumentado Henri Ellenberger).

Kaj poste… bone, poste la taglibroj estis forgesitaj, ĝuste pro tio, ke ili ne estis parto de la oficiala arkivo. Estis, fakte, Irène mem, kiu rememoris pri ili. Kiam antaŭ 3–4 jaroj ŝi vizitis la arkivan centron, ŝi konstatis, ke la taglibroj ne estas tie kun la ceteraj arkivaĵoj. Ŝi do prenis kelkajn el tiuj kajeroj el la sekurstokejo kaj reportis ilin al Montrealo.

Kune kun Irène Ellenberger fine de 2022 ni skanis la unuan kajeron de la taglibroj (oktobro 1940 – januaro 1943). Mi legis la skanaĵon kaj resumis la taglibron (en la angla lingvo) por la familio en decembro 2022, ĉar Irène estas la sola, kiu lernis Esperanton por povi legi la kajerojn de sia patro.

Min ege ĉagrenas la forpaso de la aĝa frato de Irène, Michel Ellenberger, en 2023 (cetere, ofte menciita en la taglibroj), sed mi tamen ĝojas, ke li povis legi mian resumon antaŭe. Intertempe Irène kaj ŝia nepino skanis plurajn aliajn taglibrojn.

Irène jam legis kelkajn aliajn, kaj eĉ aldonis al la pdf-oj diversajn notojn: ekzemple, por deĉifri la personajn nomojn, mallongigojn, aŭ por doni kuntekston al la skribaĵoj: ja ŝi estas la sola persono, kiu povas tion fari.

Ni, montrealanoj, krome formis etan komitaton por helpi direkti la laborojn pri la taglibroj. Kelkaj el ni havas ligojn al universitatoj en Kanado kaj Eŭropo,

Kiu estas Henri Ellenberger, kaj kial li gravas por la nuntempaj esperantistoj? Se vi guglos "Henri Ellenberger", vi trovos ĉ. 30 mil trafojn. Unu el la fundamentaj verkoj de la historio de psikiatrio estas lia plej konata verko, la 932-paĝa, enciklopedieca The Discovery of the Unconscious: The History and Evolution of Dynamic Psychiatry (1970), citita en ĉirkaŭ 8 mil akademiaj verkoj nur en Google Scholar.



Henri Ellenberger verkis ne nur librojn kaj sennombrajn fakajn artikolojn, sed ankaŭ infanlibron (ilustritan de Irène mem), libron pri etnografio de la regiono Poitou en Francio kaj eĉ teatraĵon (vi povas legi plene en la biografio de Ellenberger fare de Yanacopoulo). Li instruis en universitatoj en Eŭropo, Usono kaj Kanado, kaj prelegis internacie.

Li estas unu el la granduloj en la fako de kompara psikiatrio, kiu persone konis kelkajn "gigantojn" de la fako. Ekzemple, li multe korespondis kaj persone renkontis Karl Jung, dum li loĝis kun la familio en Svislando. Pri tio Irène havas interesan infanaĝan memoron.

Iam postmilite Jung vizitis ilin kaj alportis "enorman skatolon da ĉokolado". Irène diras: "Ĝi verŝajne estis tute normalgranda, sed en mia memoro estis la plej granda skatolo da ĉokolado, kiun mi vidis ĝis tiam, kaj la ĉokolado estis la plej bongusta afero iam ajn!"

Iuj specialistoj konsideras Henri Ellenberger "patro de historiografio de psikiatrio" (laŭ la anglalingva Vikipedio). Li kunkreis la fakojn etnopsikiatrio kaj transkultura psikiatrio: disciplino sur la kruciĝo de psikiatrio, etnografio

kaj sociaj sciencoj.

Krome, li multege kontribuis al medicina enciklopedio (EMC: Encyclopédie Médico-Chirurgicale) kaj estis ankaŭ praktikanta kuracisto – psikiatro kaj specialisto pri nervaj malsanoj – kaj (pli mafrue) krimologo, kun interesoj en mil aliaj kampoj (sociaj sciencoj, studado de popolaj kredoj, popolaj kuracmanieroj, kredoj je sorĉado kaj popola magio, kaj ankaŭ teologio).

En la 1970-aj jaroj lin bedaŭrinde trafis la Parkinson-malsano, tiel ke li devis ĉesi labori pri kelkaj aliaj libroj kaj ankaŭ pri la intima ĵurnalo.

Sed liaj ideoj estis tiom revoluciaj kaj restas tiom aktualaj, ke eĉ tre lastatempe aperis kelkaj liaj libroj posteume, redaktitaj de Emmanuel Delille (Etno-pshychiatrie – franclingve, ĉe ENS Éditions, 2017, kaj ĝia traduko en la anglan, Ethnopsychiatry, ĉe McGill-Queen's University Press, 2020; Une histoire comparée de la psychiatrie, 2021, Éditions Rue d'Ulm).

Henri Ellenberger brile karieris universitate kaj profesie, sed la vivo de la homo Henri Ellenberger ne facilis. Problemoj de sano, zorgoj financaj, longaj periodoj de apartiĝo de sia familio, la infero de la Dua Mondmilito kaj la bonŝanco eskapi kun la familio al Svislando. Poste, malfacilo enmigri en Usonon kaj, kompreneble, la neceso konstrui la vivon en la Nova Mondo: unue en Usono, poste en Kanado…

La plej bona fonto pri la vivo de Henri Ellenberger estas la 330+-paĝa franclingva libro Une Vie ("Vivo") de Andrée Yanacopoulo (Liber, 2009), sed ankaŭ Vikipediaj artikoloj angle kaj france donas sufiĉe bonan bazon. Ĉi tie mi nur rapide resumos lian vivon.

Henri Ellenberger naskiĝis en Rodezio (nuntempe Zimbabvo) en 1905, kaj mortis en 1993 en

Henri Ellenberger ou **Henri F. Ellenberger**, né en 1905 et mort à Montréal en 1993, est un psychiatre canadien d'origine suisse.

Biographie [modifier | modifier le code]

Henri Ellenberger naît à Nalolo (Barotseland, Rhodésie du nord-ouest)[1] dans une famille suisse lettrée de missionnaires protestants (SMEP) installés en Afrique du Sud. Il est le fils de Victor, pasteur et missionnaire, qui s'attacha à préserver la mémoire des Bushmena dans son ouvrage *La Fin tragique des Bushmen*)[2] et d'Évangéline Christol. Ses frères François et Paul, paléontologues (Paul était aussi pasteur) seront réputés dans leurs disciplines.

Il passe son baccalauréat en 1924 à Strasbourg, où il poursuit ses études à la faculté de médecine. Durant ces années alsaciennes , il assiste à des conférences de Fernand Baldensperger, Maurice Halbwachs et du professeur Charles Blondel, psychologue farouchement hostile à Freud[3, 4].

Étudiant, attiré par l'Histoire, il lit Marc Bloch, initiateur de l'École des Annales. Mais ce n'est qu'en Suisse, au début des années 1950, qu'il commencera à se former aux méthodes historiques.

En novembre 1930, il se marie en l'église orthodoxe de Saint-Serge à Paris avec Esther Von Bachst, dite Émilie, qui est originaire de Russie.

Il vient rapidement poursuivre ses études à Paris et est reçu en 1932 au concours de l'internat des Asiles de la Seine, puis il devient résident à Saint Anne, dans le service du Dr Édouard Toulouse puis celui du Dr Joseph Capgras.

Il découvre la Psychiatrie dynamique sous l'égide de Pierre Janet, alors professeur au

Henri Ellenberger



Biographie

Naissance	6 novembre 1905 Rhodésie du Sud
Décès	1er mai 1993 (à 87 ans) Québec
Nom de naissance	Henri Frédéric Ellenberger

Kanado, do, antaŭ 30 jaroj. Li venas de tre konata familio de svisfrancaj protestantaj misiistoj senditaj al la sudo de Afriko. En la retejo de la Brita Muzeo vi povas legi kelkajn informojn pri la avo de Henri, pastro David-Frédéric Ellenberger, kiu pasigis pli ol 45 jarojn kolektante buŝajn tradiciojn de la popolo Soto kaj kies laboro daŭre estas la bazo por la etna historio de tiu popolo en la nuntempa Lesoto.

La patro de Henri, same misiisto, verkis libron pri la lastaj boŝmanoj en Afriko (La fin tragique des bushmen: les derniers hommes vivants de l'âge de la pierre, 1953) kaj tradukis el la lingvo soto la epopean romanon Chaka de Thomas Mofolo por la eldonejo Gallimard (tiun verkon oni konsideras unu el dekduo de la plej gravaj literaturaj verkoj de la 20-a jarcento el Afriko).

La Ellenberger-familio en Afriko (Basutolando) ĉirkaŭ 1909 aŭ 1910 (4-5-jara)

Unu frato de Henri estis konata geologo, kaj eĉ mineralo portas lian nomon (Ellenbergerite); du aliaj fratoj estis paleontologo kaj pastro. Ankaŭ alia avo de Henri, Frédéric Christol, estis konata etnografo kaj ankaŭ pentristo – fakte, pluraj el la pentraĵoj en la salono de Irène en Montrealo estis de ŝia avo, pastro Christol.

Sed sufiĉas pri la fama familio, ni revenu al nia Henri. Li pasigis sian infanaĝon en Afriko (kaj eĉ parolis la sotan lingvon infanaĝe). En 1914, 9-jara, li estis sendita al Francio por studi gimnazie kaj universitate, tuj antaŭ ol la mondon surombris la Unua Mondmilito.

Li havis interesojn pri pluraj aferoj, sed fine li elektis medicinon kaj doktoriĝis en 1934, laborante ĉe la Hospitalo Sainte-Anne (kie nun troviĝas liaj fakaj arkivoj). Kelkajn jarojn antaŭ sia doktoriĝo, li geedziĝis kun Émilie (Esther) von Bachst, rusa elmigrinto probable de juda origino, konvertiĝinta al ortodoksa kristanismo. Émilie kaj Henri havis kvar infanojn.

Post la studoj, li akiris medicinan praktikon kiel specialisto de nervaj malsanoj, en Okcidenta

Francio – tio ekzakte estas la loko, kie li loĝis dum li verkis la unuan taglibron.

Kio estas en la taglibroj? Mi plene legis nur la unuan kajeron – kaj mi trovis ĝin absolute interesega, informplena kaj kortuŝa. Mi legis la biografion de Henri Ellenberger kaj kelkajn aliajn materialojn pri li, kaj mi trovas, ke ĝuste tiuj taglibroj alportas valoregan aldonaĵon al la jam ekzistantaj materialoj – ili malkovras lin kiel homon: homon komplikan, homon pasian kaj emocian, kun multaj duboj kaj internaj konfliktoj.

Parizo ĉirkaŭ 1930 dum liaj studoj en psikiatrio (Hôpital Sainte-Anne, Parizo)

Mi trovis, ke ofte la persono, kiun mi malkovris legante la unuan intiman taglibron, ne vere respondis al la imago, kiun mi havis pri li post niaj interparoloj kun Irène, kaj ankaŭ leginte lian biografion, kie aperas intervjuoj de homoj, kiuj konis lin persone…

Ellenberger ofte verkis kun superlativoj – kvazaŭ en sia intima vivo li ne konis moderecon nek rezerviĝemon – dum ekstere, eĉ al sia propra familio, ŝajne, li aspektis kiel homo tre rezervita, modera, ne emocia… Mi pensas, ke la malkovro de tiuj taglibroj vere helpos vidi Henri Ellenberger ne nur kiel scienciston, historiiston, etnografon, verkiston, enciklopediiston kaj akademiulon… sed ankaŭ kiel homon, tutsimple, senartifike kaj sen maskoj.

Li komencis verki la unuan taglibron en plej malfacilaj cirkonstancoj – estas oktobro 1940, kaj li estas kun la familio en Poitiers, sub la german-nazia okupado. Kiam Francio malvenkis la unuan parton de la milito, la registaro de Vichy suspendis demokration, la respublikon kaj multajn rajtojn. Interalie, ĝi malpermesis praktiki medicinon al eksterlandanoj (kaj al tiu kategorio falis personoj kun ne-denaska franca ŝtataneco, plus la homoj,

kies gepatroj ne estis francoj…)

La ĉefa celo estis la judoj, sed li same estis viktimo de tiu leĝo. La Vichy-registaro dekrete nuligis la ŝtatanecojn ricevitajn post 1927: kaj tia estis la kazo ankaŭ de Henri: la familio Ellenberger ricevis francan ŝtatanecon nur en 1939.

Ĉio tio signifis, ke li ne povus praktiki la medicinon kaj lia familio restus sen vivrimedoj. Fakte, ĝuste tial li komencis la unuan taglibron: listigante ĉion, kion li povus fari, se li ne plu povus praktiki (en la listo estas, interalie, verkado, filozofio, lingvoj, ktp.). Eble, por Henri la verkado de tiu persona taglibro estis maniero ordigi la pensojn kaj eldiri tion, kion li ne povus eldiri alimaniere, en maniero diskreta kaj sekreta.

Henri laboras kiel kuracisto en Poitiers, sed lia enspezo ne estas sufiĉa por vivteni la familion. Mankas pagantaj klientoj, dum la ŝuldoj kreskegas – kaj krome, en ajna momento li povas perdi eĉ sian magran kuracistan enspezon pro la frenezaj ksenofobiaj leĝoj…

Li tamen faras multe da laboro, interalie, kun la hispanaj rifuĝintoj de la Hispana Interna Milito (li parolas ankaŭ la hispanan lingvon): apud Poitiers troviĝas rifuĝejo por tiuj hispanoj. Li parolas kun bedaŭro pri la fermo de tiu loko, la amasaj arestoj de la rifuĝintoj kaj iliaj "kaŝ-ludoj" kun la polico. Kelkaj liaj intimaj amikoj estas, fakte, rifuĝintoj de tiu milito.


1 Voyages
1940
13 Oct. Commencé ce journal à Poitiers
25 Oct. (soir) jusqu'au 28 Oct. : Paris. Retour à Poitiers le 29.
24 Novembre : St Savin, Limoges.
25 : Périgueux, Bergerac, Laforce.
26 : Bergerac, Agen, Auch
27 : St Christie d'Auch, Montauban.
28 : Marseille
29 : Montauban, Limoges, St Savin
30 : Retour à Poitiers.
1941.
14 au 18 Janvier : Voyage à Paris.
29 Janvier : quitté Poitiers définitivement ; arrivé à Tours.
30 Janvier : arrivé à Bourges.
17 Mars (soir) au 19 Mars (matin) : voyage à Dijon
1er Avril (soir) au 5 Avril (matin) : voyage à Poitiers
20 au 21 Avril : dernier voyage à Poitiers
Vendredi 25 Avril : passage de la ligne de démarcation : Bourges → Bussy s/Aurron, Levet, St Florent-sur-Cher
V. 25 à Lundi 28 : St Florent-s-Cher. 28 : Départ, Montluçon.
Mardi 29 et Mer. 30 : Lyon.
SUISSE : 1er Mai : arrivée à Genève. 1er et 2 Mai : Genève.
5.3 Mai : arrivée à Berne.
7 Mai : matinée à Münsingen
15 Mai : journée à Oelleberg.
22 Juin : journée à Rüdersweil
5-6 Juillet : Week-end à Payerne
1942
31 Juillet : parti pour Bâle
22 (soir) – 24 (matin) : court séjour à Ittigen
3 Sept : excursion à Pratteln
27 Sept : après-midi à Liestal
1er Oct : départ de Bâle, retour à Ittigen

2 Journal N°1
Journal commencé le 18 Octobre 1940
Pensée d'Epictète (n°95) : "Jusques à quand différeras-tu de te juger digne des plus grandes choses ?.... Tu as reçu les préceptes auxquels tu devais donner ton consentement, tu l'as donné ; quel maître attends-tu donc encore, pour remettre ton amendement jusqu'à son arrivée ? .... Ne te tois digne dès aujourd'hui de vivre comme un homme, et conduis-toi comme un homme qui a déjà fait quelque progrès dans la sagesse ...."
Tagoj longaj kun pesanta atendado. Iome sufiĉis spirmalfacilo, kiel la antraŭaj tagoj. Hodiaŭ matene aloenis ennuafoje nova sentimentulino. Poste, doktor. Quiroz, kiu trovis E. necesperebla plibonigita je sia fingra infekto. Renkontis la Q-ojn kun kiojn prenis lecionojn de g-lingvo. Posttagmeze promenetis kun Elena, ĝis ges. Barbier kaj la familio DelRio. Legis laŭtvoce al E. (Tagskribado de André Gide)
14 Octobre 1940. Extrait du Journal d'André Gide (éd. Pléiade p. 29) : "La vie d'un homme est son image. A l'heure de mourir, nous nous refléterons dans le passé, et penchés

Liaj plej granda deziro kaj vivneceso estas elmigri el Francio nazie okupita. Li provas elmigri al Meksiko kaj Usono, kaj en la taglibro li tre detale priskribas ĉiujn strebojn kaj la burokratiajn murojn, kiujn li trafas fojon post fojo. Li donas detalojn de sia ĉiutaga malfacilega vivo en Francio sub nazioj, ĝis la plej etaj detaloj: pri la kostoj de aferoj, la (mis)funkciadoj de la trajnoj kaj rakontoj el la fronto.

Min tre kortuŝis aparte unu tia rakonto. Dum iu

nokto li veturis per trajno kun eksa militkaptito, kiu rakontis pri la teruraĵoj fare de la germanoj, spertitaj ne nur en la batalkampo, sed ankaŭ en la rilatoj de la germanaj soldatoj kun la militkaptitoj.

Ekzemple, kiam german-nazia soldato pafis francan oficiron, ĉar tiu rifuzis doni al li siajn tranĉilon kaj forkon. Kaj pri la terura traktado de la francaj militkaptitoj (oni donis duonlitron da frostigitaj terpomoj kaj iom da pano por 5 viroj, ĉiuj perdis 20-25 kilogramojn).

1948: Henri Ellenberger, lia filo André, lia edzino Émilie, Michel, Irène kaj Hélène

Min iom amuzis la anekdoto, kiam li parolas pri "germana soldato", kiu aĉetis en franca butiko britan tabakon (ŝajne, li estis ne tre bone kaŝita brita spiono). Kaj pri la usonaj kaj britaj aviadiloj, kiuj skribis en la aero la vortojn "OK" aŭ "courage" (kuraĝo). Li foje parolas pri aferoj eble bagatelaj laŭ la granda skalo, sed kiuj estas emociantaj por li mem, en la momento.

Ekzemple, pri hispanaj infanetoj, kiuj faras mokkanton kaj sekvas lin kantante: "El medico del refugio, -fugio, -fugio" – tio ofendas kaj demoralizas lin. Li parolas pri la malsameco de vivo en kelkaj urboj: Marsejlo, Parizo, Poitiers, pri la oftaj noktaj veturoj por provi aranĝi la elmigradon.

Li oftege vojaĝas kaj havas konatojn ŝajne en ĉiu urbo, kaj ĉiam li alportas donacojn (ofte, simplan manĝaĵon) al homoj, kiujn li vizitas. Jen li parolas pri la ĉiutagaj timoj, ekzemple, pri bombado fare de la britoj, kaj jen li spekulacias pri la iro de la milito…

Li foje parolas pri siaj infanoj kaj la familio kaj ofte rakontas siajn proprajn sonĝojn, kaj poste mem analizas ilin (tre ofte la sonĝoj kaj la analizoj estas en la franca lingvo – jen alia abunda kampo por la specialistoj en la fako). Li analizas ankaŭ sin mem kaj sian vivon. Foje li skribas tute mallonge: datoj, lokoj, ĉefaj faktoj – kaj kiam li estas en pli favoraj cirkonstancoj, li revenas al la eventoj kaj parolas pri ili pli longe, kun detaloj.

La kajeroj ofte havas biletojn al diversaj kongresoj, eventoj, transporto, ktp.

La unuan paĝon de la taglibroj li verkis plej fine, listiga ĉiujn vojaĝojn de la jaro. Fine de la kajeroj li ofte algluas diversajn biletojn (ekzemple por trajno kaj metroo, por spektakloj, kinejo, cirko aŭ muzeo, paspermesilon por bibliotekoj, en unu kajero li eĉ krajonas reliefan librokovrilon).

Min tre impresis, ke eĉ en la plej eksterordinare malfacilaj cirkonstancoj li neniam maltrafas la okazojn viziti la muzeojn, bibliotekojn, kinejojn, operojn, ĉu sola ĉu kun la infanoj.

La plej impresa kaj plej atentokapta parto de la taglibro por mi estis la rakonto de lia eskapo al Svislando, post kiam la provoj elmigri al Meksiko kaj Usono fiaskis. Por la legantoj de Libera Folio, mi transskribis etan ĉerpaĵon ĝuste el tiu parto. Svislando estis natura elekto ĉar li mem estis svisdevena – laŭ la civitaneco de sia patro – kaj Svislando havis sindevigon akcepti ĉiun svison, eĉ tiujn, kiuj neniam loĝis tie antaŭe.

La elmigrado estis malfacilega ekde la burokratia infero pri la dokumentoj, forvendo de la rajto praktiki kaj de ĉiuj havaĵoj estis terure malfacila procezo, kaj nekredeble danĝera. Ne nur ĉar lia edzino estis, probable, juddevena (ŝi venis al Francio post la oktobra revolucio, kun falsaj paperoj kaj sub falsa nomo), sed ankaŭ ĉar li celis elmigri kun siaj infanoj kaj sub falsaj pretekstoj.

Do, la infanoj devis bone kunlabori pri la “oficiala” elpensita rakonto, en la espero ke oni ne kontrolos la poŝojn pri la mono, kiun ili kunportis. Alia timo estas ke oni ne permesos al li eliri entute, ĉar oni ĵus akceptis leĝon, kiu malpermesis al ĉiuj viroj ĝis 40 jaroj eliri el la lando.

Fakte, temis ne nur pri unu eliro, sed pri du eliroj:

la unua estis el la “okupita zono” de Francio al la “libera zono” (sub la marioneta registaro Vichy), kaj la dua poste, el la “libera zono” al la vera celo de la elmigro: Svislando.

La unuan transiron, el la okupita zono al la libera zono, helpis fari homo, kiun Henri nomis “la Mirindulo”. Tiun transiron li ne priskribas, nek donas lian veran nomon – li nur skribas, ke li ne povas tion fari por ne endanĝerigi la Mirindulon mem kaj la homojn, al kiuj li helpis (tre bedaŭrinde, la nazioj mortigis la Mirindulon baldaŭ post ilia transiro. Tion mi eksciis el la biografia libro de Yanacopoulo).







Tiun unuan transiron li faris ne kune kun la edzino kaj la infanoj, por ke oni ne suspektu, ke temas pri elmigrado. Tre impresis min ke eĉ dum tiu malfacila kaj timiga situacio, haltinte en la Libera Zono, en Liono, por apenaŭ unu tago antaŭ la forveturo al Svislando, li trovis tempon por viziti kun la familio la muzeon de krimologio! Verŝajne, la muzeo impresis lin tiom multe, ke jarojn poste li fariĝis ankaŭ krimologo, en la Universitato de Montrealo, Kanado.

La tono de la taglibro ŝanĝiĝas ĉe la eskapo kun la familio al Svislando: li estas en sekureco kaj povas vivi kaj labori. En Svislando li plie studas, faras ekzamenojn, lernas la germanan lingvon (kaj havas malfacilecon kompreni ĉiujn dialektojn de la svisgermana parolante kun siaj pacientoj), kaj verkas, verkas, verkas. Li verkas science, korespondas kun la grandaj pensuloj de sia tempo, verkas librojn. Tie, en Svislando, li skribas kun tenero pri la naskiĝo de sia plej juna filineto – aminda Irène, kiu nun estas la ĉefa motoro de tiu ĉi projekto.

Ĉu li estis Esperantisto aŭ Esperanto-parolanto? En la unua taglibro Henri Ellenberger ne menciis, kiel kaj kiam li lernis Esperanton. En la konversacioj kun Irène mi eksciis, ke li parolis pri Esperanto kaj pri Zamenhof – tre pozitive – al siaj infanoj, sed oni ne scias, kiam kaj kiel li lernis nian

lingvon.

Irène menciis, ke li ofte uzis la gastigan reton de Esperantistoj dum siaj vojaĝoj, kaj eĉ estis en la 1960-aj jaroj UEA-delegito de UMEA – Universala Medicina Esperanto-Asocio, laŭ la arkivoj de UEA. Sed li, certe, ne estis movadema – la sola mencio pri li en UEA estis lia delegiteco. Ellenberger parolis plurajn lingvojn, kaj lerni Esperanton, tutcerte, estis facile por li.

Tamen, li verkis tiel en Esperanto, kiel persono, kiu ne multe uzas aŭ aŭdas la lingvon en la ĉiutaga vivo (lia Esperanto estas ĝenerale bona kaj tute komprenebla). Li, tutcerte, legis en Esperanto, kaj havis etan bibliotekon de Esperantaj libroj, kiujn post lia morto ricevis Esperanto-Societo Kebekia en 1993. Irène pensas, ke li eble verkis en Esperanto kiel en sekreta lingvo, ĉar nek lia edzino nek la infanoj parolis aŭ povis legi Esperanton (nek, plej verŝajne, la aŭtoritatoj, se oni subite konfiskus la librojn).

1974, Simpozio en Japanio

Mi ne trovis aliajn lokojn, kie li verkis en Esperanto (ekzemple artikolojn) do, plej verŝajne, tiuj ĉi taglibroj estas la solaj. Mi supozas, ke estas pli ĝuste nomi Ellenberger “Esperanto-parolanto” ol “esperantisto”. Tamen, mi pensas, ke ni ĉiuj, ĉu esperantistoj aŭ Esperanto-parolantoj, povas esti vere fieraj, ke Henri Ellenberger estis “unu el ni” kaj verkis en nia lingvo!

Nun ni mense revenu al la salono de Irène kaj, finfine, mi respondu la lastan brulantan demandon – do, kion celas, finfine, la projekto Ellenberger? Tion provas difini nia eta laborgrupeto en la domo de Irène.

Unue kaj plej grave, ni celas igi la korpuson Ellenberger – do, la enhavon de ĉiuj intimaj taglibroj – disponebla al esperantistoj, sciencistoj, esploristoj, la familio mem kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas legi ilin.

La tri postvivintaj gefiloj de Henri Ellenberger: André, Irène kaj Michel (Michel mortis ĉi-jare)

konsentis pri senredakta kaj plena disponigo de la taglibroj al la publiko, eĉ se foje li ja parolas pri la infanoj, kaj eĉ se, teorie, povas esti iuj tiklaj momentoj – kvankam Ellenberger mem iom cenzuris sin mem, forigante tie kaj jene kelkajn paĝojn.

Do, ni volas trovi institucion (bibliotekon, universitaton, arkivon), kiu enarkivigos la kajerojn mem kaj disponigos ilian enhavon (la pdf-ojn), por ke oni povu facile trovi ilin per kutimaj bibliotekaj/arkivaj/universitataj retoj, troveblaj per serĉiloj.

Due, ni volas tekste rekoni la enhavon de la kajeroj kaj fari ĝin serĉebla kaj pli facile tradukebla. Tiu ĉi estas la parto, kiu postulas plej multe da laboro kaj kiu ne estus ebla sen financado. Ni konsideras softvaron, kiu povas rekoni manskribitajn tekstojn, por fari la bazan tekst-rekonadon kaj poste redakti la rezultojn.

Ni ankoraŭ ne certas, kiom sukcesa estas tia teksta rekono, interalie, ĉar en la kajeroj troviĝas ne nur Esperanto, sed ankaŭ kelkaj aliaj lingvoj (la franca, la germana, ktp.), kaj foje li almiksas kelkajn nacilingvajn vortojn al Esperantaj frazoj. Tiaj softvaroj ekzistas kaj estas uzataj por similaj, sed nacilingvaj projektoj, kun ia sukceso.

Proksimume 1918 (13-jara)

Do, konsiderante la amplekson, ni pensas ke havos sencon provi maŝin-rekonon de la teksto, kaj ni esperas trovi partnerojn kaj financadon por tiu taskego.

Trie, ni esperas ke la rezulto de 1 kaj 2 estos aperigo de redaktita verko – ĉerpaĵoj el la taglibroj elektitaj, redaktitaj kaj tradukitaj nacilingven, por la ĝenerala kaj faka publiko (ideo, al kiu tre inklinas Irène). La enhavo de la taglibroj estus interesa al esploristoj en plej diversaj kampoj: historio, la “psi”-sciencoj (psikiatrio, psikologio, ktp.), etnografio, medicino ĝenerala, sed ankaŭ ege interesa por la ĝenerala publiko.

Ĉu ĝi povus rezultigi iujn artprojektojn – eble teatraĵon? Oni atendu por vidi! La sukceso de la historia teatraĵo “1910” eble inspiros min verki plian!

1914 (proks. 9-jara)

Dum ni provos trovi la partnerojn kaj la financadon en tiu ĉi granda aventuro pri la disponigo kaj teksta rekono de la tuto, Irène laboregas pri la aldono de la notoj kaj la ciferecigo de la kajeroj, kiuj jam estas en Montrealo. “Vi komprenas, la laboro pri la notoj estas iom urĝa”, ŝi diras.

Ŝi planas alporti al Montrealo ĉiujn restantajn kajerojn el Francio kaj ciferecigi kaj aldoni tiom da notoj, kiom eblas. Se iuj el la legantoj emas aliĝi al nia laborgrupeto aŭ havas ideojn pri eventuala kunlaboro, estu liberaj kontakti la redakcion, kiu transdonos al mi vian mesaĝon. Ni bonvenigas kaj universitatanojn, kaj ne-universitatanojn al kunlaboro!

Kun specialaj dankoj al Irène Ellenberger kaj la tuta laborgrupo pri Projekto Ellenberger: Pascal Dubourg Glatigny (historiisto kaj esploristo de CNRS en la Centro Marc Bloch, Berlino, kaj de Centre Alexandre Koyré, Parizo); Geoffrey Greatrex (historiisto, profesoro de Universitato de Otavo); Gabriel Labrie (lingvisto, kurs-gvidanto en Universitato de Montrealo); Nicolas Viau (prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia), kaj Emmanuel Delille, historiisto kaj esploristo, interalie, en la Centro Marc Bloch (Berlino). La fotoj devenas de Irène Ellenberger, el familiaj arkivoj.

Unue aperis en *Libera Folio (2023-10-24)*



Fragmento el la taglibro de Henri Ellenberger

Kajero 1 (oktobro 1940 – januaro 1943), paĝoj 83-87.

La teksto sube estas redaktita, sed ne plene. Mi korektis evidentajn erarojn kaj redaktis lokojn, kiuj ne estus kompreneblaj sen redaktado, sed mi lasis malglataĵojn diversajn, por ne tro ŝanĝi la stilon kaj la enhavon; memoru, ke temas pri taglibro, kiun Henri Ellenberger verkis haste, senredakte kaj en malfacilaj cirkonstancoj. Mi ankaŭ aldonis kelkajn komentojn en kvadrataj krampoj – Ĵenja Amis

Ĝeneve, Vendredo, 2 majo (matene) [1941]

Memorigo:

- Lunde 28 [de aprilo 1941]: alveno de infanoj k de Emilie en St. Florent, k envagonariĝo nokte en Montluçon
- Marde 29 [de aprilo 1941]: tago en Lyon; vizito al Muzeo
- Ĵaŭde 1 [de aprilo 1941]: fruege, eliro el Lyon; alveno al Ĝenevo
- (vespere). Lunde, 28 [de aprilo 1941].

Matene, mi preparis nian vojaĝon, metante librojn, paperojn k kelkajn aliajn pakaĵojn en kesto, kiun mia amiko, s-ro Rosselet, havigis por mi (posttagmeze, lia bofilo, s-ro Sterck, kies profesio estas lignaĵisto, ĝin fermis k najlis.). Mi manĝis ĉe s-ro Rosselet. Posttagmeze, mi atendis, unue, la geinfanojn; ĉirkaŭ 2:30, paŝetante en la strato, mi rekonis la aŭtomobilon de Mirindulo, k Miŝel k Elen [Miŝel k Elen estas la nomoj de la infanoj] ridentantaj k signalantaj. Ni kunpromenis dum pli ol unu horo (aŭ unu k duonhoro) k fine, dua aŭtomobilo aperis, enhavanta Emilie-n [estas la edzino] k du virojn; Emilie al mi rakontis, ke ŝi, ĉe la limo, akurate ekzamenita estis je ŝia korpo k ŝiaj vestoj, el la piedoj ĝis la kapo. Ŝi suferis malbonan momenton k ŝiaj kunvojaĝantoj eĉ pli malbonan!



Ni iris ĉe s-ro Rosselet k manĝis ĉe li. Lia bofilo transportis mian pezan keston ĝis la stacidomo.

Nia vagonaro forlasis St. Florent ĉirkaŭ 7a horo, kun ni feliĉaj k dankemaj.

Nokte, ni alvenis en Montluçon, kie ni devis atendi dum kelkaj horoj. Ni eniris en la atendejo, k sidiĝis; eble, duon aŭ tri-kvaronhoroj poste, iu fraŭlo pasis k sciigis, ke ekzistas “Centre d’accueil” [“Akceptejo”], proksime al la stacidomo. Ni tien iris kun tri aŭ kvar aliaj familioj; estis amuze vidi tiajn bonfarulojn, plenajn de bonvolo, sed malbone kutimemaj k iom malspertaj. Ĉirkaŭ la 4-a matene ni reenvagonariĝis.

Marde, 29 [de aprilo 1941]

Ni alvenis al Lyon. Ni matenmanĝis en kafejo (tre kara estis). Poste, ni serĉis k trovis la domon, kie loĝas Chweitzer (sed ne ĉeestis tiumomente). Mi serĉis hotelon, kie mi loĝus, k malfacile trovis; tiam Chweitzer reveninta estis. Ĝojege ni lin retrovis, ni longtempe kunparolis. Ni kunmanĝis en bonega malgranda restoracio. Posttagmeze ni iris ĉe la svisa konsulejo, kie malbonan sciigon ni ricevis: iu oficisto al mi certigis, ke mia pasporto ne akceptata estos de la Francoj ĉe la limo, ĉar nova dekreto malpermesis al ĉiuj viroj, de 17 ĝis 40 jaroj, foriri el Francujo, k ke li konis junulojn, kiuj, ĉe la limo, estis resenditaj internen.

Mi, el tio, ege maltrankviliĝis, k tuj iris ĉe la “Service social d’aide aux émigrants” [helpcentro por elmigrantoj], Cours Morand, kie mi povis ricevi ĝustajn sciigojn. Tiam mi iris ĉe la administra oficejo, kie mi iris al la oficejo de pasportoj. Iu juna oficisto (kiu, ŝajne, tre kapabla estis) al mi diris, ke mia pasporto ne estus rifuzota, ĉar ĝi estas subskribita la 21-an de aprilo, dum la leĝo datiĝas de la 17-a de aprilo. Li miris, ke mi ricevis la permeson, malgraŭ tiu leĝo (vere, estas precipe ĉar la oficistino en Poitiers tre neinformita estis!); k li iom trankviligis min. Ni kunparolis kun Chweitzer, k ni decidis ne daŭrigi nian restadon en Lyon, timante ke la Francoj aliajn

dekretojn ordonus, eĉ pli severajn. Ni vespermanĝis kun tiu bonega amiko en nia hotelo (Hotel Olympia, rue des Remparts d'Ainay).

Merkrede, 30 [de aprilo].

Ni pasis la tagon en Lyon, preskaŭ tute kun Chweizer. Matene ni longtempe kunparolis kun ni iris ĝis "Palais de Justice" [Palaco de Justeco]. Mi serĉis la adreson de mia malgranda kuzino Isabelle Christol, kiun malfeliĉe mi perdis; mi ĝis serĉis ĉe la polico; la policanoj diris, ke mi ĝin petu ĉe la policestro; mi vidis la vic-ĉefon de la "Sûreté Nationale" [Nacia Sekureco], kiu amable estis kun mi, sed ne povis, laŭ lia diro, ĝin eltrovi. (Dum mia ĉeesto en lia oficejo, mi rimarkis sur la planko pakon el numeroj de malpermesitaj komunismaj ĵurnaloj, ekz., "L'avantguarde"). Ni tiam iris en Fourvière; suprenveturis per la "funikula vagonaro"; ni vizitis la bazilikon, kiu kurioza estas, de stilo neobaroka, troplena je ornamaĵoj, precipe simbolaj (ekz., simboloj de anĝeloj aŭ evangeliistoj); ni tamen tre admiris la mozaikojn. Ni ankaŭ admiris la grandan vidaĵon videblan el la larĝa teraso, ekster la baziliko. Tiam ni resubenvenis per la funikula vagonaro, k iris manĝi en la sama restoracio, kiel antaŭtage. Posttagmeze, ni unue vizitis la muzeon de krimologio k scienca polico (Muzeo del D-ro Locard), en "Palais de Justice". Tiu muzeo nin pasiege interesis, trolonge estus skribi tutajn detalojn interesajn de tiu vizito. Reirante, iomege pluvis. Ni denove serioze kunparolis pri miaj k liaj aferoj, k vespermanĝis en nia hotelo. Ni malfrue kuŝiĝis.

Ĵaŭde, 1-a [de majo 1941].

Nia lasta tago en Francujo. Ni fruege vekiĝis k leviĝis, tiam enviciĝis je kvina k duono. Vojaĝo longa, malfacila, teda, kun koroj maltrankvilaj. Ni ŝanĝis kelkfoje: unue en Ambérieu, tiam (el vagono ĝis alia) en Culoz, poste en Aix-les-Bains, plurfoje en Annemasse. En Annemasse, lasta k malfacile eltenebla maltrankvilaĵo: ekzameno de niaj pasportoj; sed, feliĉe, senhezite akceptitaj estis. Kompare, la ekzameno de nia mono k de niaj pakaĵoj estis nenio! Fine, la vagonaro forlasis Annemasse, k antaŭ ke ni povus rimarki la limon, ni nin trovis en Genève. El tiu momento, ni vivis veran fabelon de feinoj; sed ĉar malfrue estas, mi forĵetas la plumingon.


de niaj pasportoj; sed, feliĉe, senhezite akceptitaj estis. Komparante, nenio estis ekzameno de nia mono k. de niaj pakaĵoj! - Fine, la vagonaro forlasis Annemasse, k. antaŭ ke ni povus rimarki la limon, ni sintrovis en Genève.
El tiu momento, ni vivis veran fabelon de feinoj; sed, tial ke malfrue estas, mi forĵetas la plumingon.

Kuplowsky pri Vasilij Eroŝenko

Bob Williamson intervjuis por *Lumo* tradukiston el Toronto: Adam Kuplowsky. Li tradukis fabelojn de famega Esperanta verkisto, Vasilij Eroŝenko

Lumo (L): Aprilon 2023 aperis en Libera Folio artikolo de Ulrich Lins pri esperantista verkisto kaj via tiam nova libro *The Narrow Cage and Other Modern Fairy Tales*, antologio de verkoj de Vasilij Eroŝenko tradukitaj en la anglan. Kiu estis tiu verkisto?



Adam Kuplowsky (AK): Vasilij Eroŝenko estis interesega transnacia verkisto kaj esperantisto de la 20-a jarcento. Tamen malmultaj (t.e. ekster Esperantujo, Japanio, kaj Ĉinio) scias pri lia verkaro. Blindigita kiam li estis infano, li penis dissaltigi la sociajn barilojn, kiuj estis altruditaj al blinduloj de sia tempo, kaj li vojaĝis tra la tuta mondo, verkante fabelojn japanlingve kaj Esperantlingve, kaj partoprenis diversajn progresemajn movadojn. Dum mallonga historia momento, li eĉ fariĝis konata fabelisto en Japanio kaj Ĉinio, kie li amikiĝis kun multaj esperantistoj, bahaanoj, anarkiistoj kaj artistoj. Se vi konas iom pri ĉina literaturo, vi eble konas unu el liaj bonaj amikoj – tiu estis Lu Xun (Lusin), unu el la plej influaj ĉinaj verkistoj de moderna ĉina literaturo kaj fama tradukisto de la verkoj de Eroŝenko ĉinlingven.

L: Kial vi elektis la verkojn de Eroŝenko por traduki anglalingven?

AK: Mi estas tradukisto el la japana al la angla, kaj je la komenco de la pandemio, multaj el miaj klientoj haltigis siajn aferojn kaj projektojn, do mi ne povis labori multe. Dum mi atendis la revenon de miaj klientoj, mi serĉis privatan tradukprojekton por amuzi min kaj, eble, por publikigi ie, mi ne sciis kie. Ĝis tiam mi nur tradukis sciencajn dokumentojn kaj turismajn broŝurojn, sed vere mi ĉiam volis traduki literaturon. Ĉiuokaze, iam dum tiuj longaj tagoj de la frua

pandemio, mi tajpis en la interreta serĉilo la vortojn “Ukrainio,” “Poeto,” kaj “Japanlingvo”. Mi ne scias kial – mia patro estas ukraino, kaj mi ĉiam volis esplori kaj kontribui iel al la disvastigo de la ukraina kulturo, spite ke mi ne povas paroli la ukrainan. Estis la sorto, mi supozas! Do mi tajpis la tri supremenciitajn vortojn, kaj eltrovis la nekredeblan vivon kaj amuzegajn fabelojn de Vasilij Eroŝenko.

Portreto de Eroŝenko pentrita de Tsune Nakamura

Je la komenco, mi intencis traduki nur la fabelojn, kiujn Eroŝenko verkis japanlingve, ĉar mi estas japana-angla tradukisto. Sed poste, kiam mi montris miajn tradukaĵojn al Profesoro Jack Zipes, historiisto de radikalaj fabeloj, li pensis, ke mi ne havas sufiĉe da verkoj por publikigi antologion. “Vi rimarkis, ke Eroŝenko estis esperantisto,” Profesoro Zipes skribis al mi. “Ĉu Eroŝenko verkis Esperantlingve?” Tiutempe, mi ankoraŭ ne komencis lerni Esperanton, sed mi aŭdace respondis “Jes, profesoro, mi tradukos iom de liaj Esperantaj verkoj kaj sendos ilin al vi.” Mi legis ie, ke Tolstoj eklernis Esperanton dum du horoj. “Bone!” mi diris al mi mem, “mi lernos ĝin en du monatoj!” Do mi legis diversajn gramatikajn librojn pri Esperanto, kaj mendis ĉiujn verkojn de Eroŝenko de UEA, kaj kun vortaro en unu mano, kaj japanaj tradukaĵoj en la alia, mi komencis traduki la Esperantajn verkojn, vorton post vorto, poste frazon post frazo. Kaj post du monatoj, mi povis traduki sen helpo de la japana tradukaĵo!

L: Ĉu estas io, kion vi forgesis mencii en la longa biografia enkonduko inkludata en via antologio?

AK: Jes, mi volis mencii, ke Eroŝenko enkondukis la supon barĉo al Japanio! Sed mi ne sciis kiel enmeti ĉi tiun fakton en la enkondukon (haha).

L: Ĉu estas verkoj de Eroŝenko, kiujn vi ne tradukis?

AK: Estas multaj verkoj, kiujn mi ne tradukis. La kialo estas, ke mi volis koncentriĝi sur la fabeloj

de la sama speco – ĉefe, la fabeloj pri bestoj ktp. Do oni eble rimarkos, ke la antologio ne inkludas la plej bonan Esperantan verkon verkitan de Eroŝenko, t.e. "La trimova ŝakproblemo." Fakte, Will Norton, studento de lingvistika antropologio ĉe la Universitato de Texas en Austin, jam tradukis ĝin bele en la anglan, kaj mi esperas, ke lia tradukaĵo baldaŭ aperos.

L: Kiajn verkojn vi volas nun traduki?

AK: Mi ŝatus traduki verkojn, kiuj estas forgesitaj aŭ nekonataj, kaj troviĝas multaj tiaj verkoj en la mondo. Do mi havas grandan stakon da eblaj projektoj, el la japana, el la franca, kaj el Esperanto. Sed estas malfacile trovi eldonejon, kiu publikigos tiun specon de "forgesita aŭ nekonata" verko. Ĉi-momente mi tradukadas la verkojn de Verda Majo, japana esperantisto, kiu fuĝis al Ĉinio kun sia edzo por propagandi Esperante kaj batali kontraŭ la japana imperia armeo, kiu invadis Ĉinion en la jaro 1937. Mi esperas, ke ĝi aperos iam en 2024 aŭ 2025.

L: Koran dankon, kaj bonŝancon.

Aldonaj informoj:

Vi povas akiri la libron de la presejo de Columbia University Press

Legu la artikolo en Libera Folio pri tiu traduko

Sur la suba foto: en la ĉefurbo de Ukrainio nove aperis strato de Eroŝenko (el revuo Esperanto, novembro 2023)



Why does a Montreal park have a plaque in French and Esperanto?

Daniel J. Rowe (Digital Reporter, CTVNewsMontreal.ca)

This report was first published by CTV, reproduced with the author's kind permission. It includes a 2.5 minute video, including interviews with Normand Fleury, Zdravka Metz and Nicolas Viau and footage from the World Esperanto Congress in Montreal in 2022.

There is a plaque at the entrance to a small park in Montreal's Plateau that honours a Quebec workers' rights activist who learned a second language in the late 1800s and worked to spread it in the province.

That language was Esperanto, and the plaque at the entrance of the Parc Albert Saint-Martin includes an inscription in the invented language as well as French.

"Omaĝo al Albert Saint-Martin, Pioniro de Esperanto en Montrealo," the plaque reads. (In honour of Albert Saint-Martin, pioneer of Esperanto in Montreal).

"Albert Saint-Martin was really a man who

dedicated his whole life to help workers," said Normand Fleury, who helped organize the World Esperanto Conference in Montreal in 2022.

Saint-Martin, Fleury explained, founded cooperatives, libraries, and educational facilities for workers and was also an early convert to Esperanto.

"He actually learned Esperanto in 1894, seven years after the creation of Esperanto," said Fleury. "He thought that this idea to have a common language for workers was a really good idea... He was really a pioneer to create an Esperanto movement in Canada."

At the time, Fleury explained, many immigrant workers came to Quebec from European countries and did not speak English or French, so Saint-Martin hoped Esperanto would be a language that all could learn and speak.

Saint-Martin attended the first World Esperanto Convention in 1905 in France. In addition to having a park named after him, the University of Quebec at Montreal (UQAM) socialist student group commissioned a tribute mural to Saint-Martin which overlooks Parc Gilles-Lefebvre.

The plaque honouring him was installed after around 800 Esperanto speakers came to Montreal for the 107th annual event in 2022.

"It was awesome," said Quebec Esperanto Society president Nicolas Viau. "We'd been talking about it for the better part of a decade. That's a long time to be waiting for an event to happen."

The Quebec Esperanto Society includes around 200 people who meet monthly to speak and

promote the language.

A NEUTRAL LANGUAGE IN AN UNEQUAL TIME

Jewish Polish doctor Ludwik Lejzer Zamenhof created the language in 1887, hoping to add a neutral language in Europe that discarded status or hierarchy.

"Because Latin was really hard to learn, and he wanted to have a neutral language so that doctors around the world could learn this language and communicate," said Fleury. "But it wasn't the doctors that did learn it, but ordinary people, so the language spread out really fast."

Neutrality was important for Zamenhof. Viau explained that as a Jewish person living in Poland at that time, Zamenhof would have experienced a lot of inequality and prejudice.

"This pushed him to create a tool for people to better understand each other, to bridge differences, to allow people to communicate without one bowing to the other essentially," said Viau.

EASY TO LEARN

Learning the language, Fleury explained, is relatively simple.

"Esperanto is very easy to learn because out of one root, you can create many words," he said.

For example, in English, the words horse, mare, steed, equestrian, riding, and such all relate to the base word of horse.

In Esperanto, ĉevala (equestrian), ĉevalo (horse), ĉevalino (mare), ĉevaleto (pony) and other words come from the base: ĉeval

In addition, Fleury said those who speak the language are almost always non-native speakers of it.

"If you use Esperanto with Japanese people or Brazilian folks, then they made the same effort as you did to learn another language," said Fleury, who began learning Esperanto in 1979. "It's not their native tongue, it's not my native tongue, we're more on an equal level."

Fleury met his wife Zdravka Metz, originally from Croatia, at an Esperanto convention, and they speak the language at home.

"It's our common language," said Fleury. "It's neutral for both of us so we always use it with our children."

Viau, Fleury, and many of those who learn Esperanto speak multiple other languages. Fleury said his children speak French, English, Croatian and Esperanto and Viau feels confident speaking

five languages.

Viau began learning the language in 2009 after being drawn to the idea of a neutral language.

"It puts everyone on a level playing field in terms of languages," he said. "Obviously, language issues are very big in Quebec. I speak French; I care about the status of the French language in Quebec, [and] that was the first spark that got me into these kinds of topics.

"When you use Esperanto, for me at least, you can be yourself. The fact that you don't have to use the language of another people, typically in a lot of places a more powerful nation or people, opens you up to the individual in front of you."

Daniel J. Rowe is an award-winning journalist, who entered the industry as a reporter/photographer/editor for the Eastern Door newspaper in the Kanien'keha:ka



The Tribute to Albert Saint-Martin honours the workers rights activist from the late 1800s and early 1900s and overlooks Parc Gilles-Lefebvre in Montreal's Plateau. (Daniel J. Rowe/CTV News)

BELUGA EDITIONS

Accueil À propos de nous Mission étincelle Groupe de discussion Blogue Nous contacter

L'espéranto est-il compatible avec la défense des langues minoritaires ?

Une langue à vocation universelle peut-être réellement être compatible avec la promotion de la diversité linguistique ?

11/16/2023 · 3 min read

Une langue pour franchir les barrières linguistiques

Pri Esperanto ĉe Eldonoj Beluga

Ĉe Eldonoj Beluga aperis bonega mallonga artikolo pri Esperanto, verkita de la redakcio, kunlabore kun Nicolas Viau. La retejo celas konservadon de lingvoj en danĝero de malapero kaj helpon al ilia pluvivo kaj prospero.

“Ni kredas, ke por ke lingvo vivu, ĝi devas esti uzata, sed ĉefe, esti utila. Tial ni volas produkti librojn, kiuj povas helpi lingvon flori kaj renovigi sin”, diras la misio de la eldonejo.

Legu la plenan artikolon.

Pinta verko pri misteroj de planlingvoj

Detlef Karthaus

Antaŭ du jaroj la plej prestiĝa premio por germanlingvaj verkistoj estis aljuĝita al Clemens J. Setz, konata interalie pro tradukoj de William Auld al la germana. Nun en Esperanto aperis lia grava verko pri planlingvoj, ĉefe pri Esperanto. Li en ĝi verkas ne nur pri historiaj faktoj kaj biografioj, sed ankaŭ pri siaj konversacioj kun konataj esperantistoj. Pri la libro rakontas la tradukinto Detlef Karthaus.

Tiu ĉi libro legeblas aŭ de komenco ĝis fino, aŭ oni povas komenci per iu ajn ĉapitro, kiu ŝajnas plej interesa. Ĉi tiu verko memorigis min pri la libro *In the Land of Invented Languages* de la lingvisto Arika Okrent.

Ŝi lernis Esperanton kaj la klingonan kaj ĉeestis plurajn kongresojn por interkonatiĝi kun ties adeptoj. En *Abeloj*, Setz intervjuis konatajn esperantistojn kiel Jorge Camacho, Klára Ertl kaj Spomenka Štimec, inter aliaj.

La diverseco de temoj estas impona. La ĉapitro pri Charles Bliss, la inventinto de Bliss Symbolics, povus esti verko en si mem. La Blisa Skribo estas pazigrafio – laŭ PIV ”sistemo de universala skribo, kies signoj esprimas ne vortojn, sed rekte ideojn”.

Clemens J. Setz
Foto: Amrei-Marie CC BY -SA 4.0

La detaloj de la vivo de Bliss frapas onin kiel horora aventur-romano. Estante judo en Aŭstrio, li troviĝis en koncentrejo. Lia loĝejestrino Claire (kiu poste iĝis lia edzino) sukcese marĉandis kun la aŭtoritatoj por lia liberigo sub la kondiĉo ke li forlasu la landon. Li faris sian vojon tra Eŭropo ĝis li atingis Ĉinion. Tie, lernante kelkajn ĉinajn skribsignojn, li komencis evoluigi la ideon de sia Blisa skribo.

La libro priskribas liajn malfacilaĵojn kaj malsukcesojn ĝis finfine li alvenis en Kanadon. Tie lia invento estis uzata en lernejo por handikapuloj kiuj ne kapablis komuniki voĉe.

Tio ne estas la fino de la rakonto; kontraŭe ĝi estas la komenco de kvereloj kun la instruistoj, ĉar Bliss volis havi kompletan kontrolon pri la evoluo de la lingvo.

Unu temo de la libro estas la distingo inter du specoj de kreitaj lingvoj, kie en unu tipo la inventinto provas konservi plenan kontrolon (Volapuko) kaj la alia, kie la inventinto permesas al la uzantoj determini la estontan evoluon (Esperanto).

En la ĉapitro *La arto kabei* temas ne nur pri Esperantistoj, sed menciiĝas ankaŭ kelkaj sukcesaj naciaj verkistoj, kiuj subite ĉesis verki. Mi surpriziĝis pri tio kaj pensas ke eble Kabe ne estis la strangulo, kiun la esperantistoj igas lin aperi.

Elisabeth Mann Borgese, la plej juna filino de Thomas Mann, instruis al sia hundo uzi tajpilon, kaj la hundo verkis tiel nomatan poeziaĵon, kiu aperis en kanada literatura gazeto. Mi havis miajn dubojn pri tiuj paĝoj kiam mi tradukis ilin, sed lastatempe mi modifis miajn opiniojn.

Antaŭnelonge mi vidis filmeton en YouTube, kie hundoj ”parolis” uzante grandajn programeblajn butonojn. Ĉiu butono respondas al unu aŭ du vortoj. Se oni serĉas ”dog buttons” en YouTube, oni trovas kelkajn filmetojn kaj ankaŭ vendistajn ofertojn de tiuj butonoj. Ŝajnas ke la ideo de tajpanta hundo bezonis nur teknologian progreson.

La tradukado de ĉiu libro havas siajn proprajn defiojn. Ankaŭ la proceduro uzata povas ŝanĝiĝi. En la pasinteco por trovi tradukindan libron mi pensis pri libro jam konata al mi. Mi relegis ĝin por serĉi malfacilaĵojn. Poste mi serĉis tradukon en alia lingvo.

Por germana romano mi legas ankaŭ la anglan tradukon kaj aldone aŭ la francan aŭ la hispanan. Per la kvalito de ĉi tiuj tradukoj mi decidas ĉu mi kapablas entrepreni tiun taskon.

La situacio kun *Abeloj* estis tute alia. *Abeloj* ankoraŭ ne estis tradukita en aliajn lingvojn. La eldonejo petis min traduki la libron kaj mi konsentis ne konante kaj ne leginte ĝin. Mi decidis ke tio estas farebla, ĉar mi jam tradukis eseon de Setz pri William Auld, kiu aperis en Beletra Almanako N-ro 33 en 2018.

Kelkfoje fariĝis evidente, ke la aŭtoro verkis por nacia legantaro. Li citis germanan poeziaĵon sen indiki la titolon kaj la aŭtoron. Mi tuj supozis ke tiu devas esti parto de la ĝenerala klereco, kiun germanlingvaj junuloj devas parkerigi en la lernejo. Tial mi trovis la mankantan informon en la reto. Tio estus koŝmaro kiam mi studis la tradukarton antaŭ 50 jaroj sen komputiloj kaj serĉrobotoj.



Reklamo por Volapuko en ilustraĵo de la libro

Aliloke la aŭtoro mencias Esperantan rakonton tradukitan el la ĉina sen mencii la ĉinan titolon. Tio certe interesus ĉinan leganton. Kun tre baza kono de la ĉina kaj iom da retaj akrobataĵoj mi trovis mencion de la rakonto en malnova numero de *El Popola Ĉinio*.

Kiam la aŭtoro citis la romanon *Hodler en Mostar* de Spomenka Štimec, li uzis sian propran germanan tradukon. Mi bezonis la originalon por ne retraduki verkon de la famkonata verkistino. Mi do faris peton en Facebook kaj multaj amikoj helpis disvastigi mian peton kaj fine Sten Johansson trovis ekzempleron de la romano en sia libraro.

Kiam la aŭtoro citas anglalingvajn verkistojn, la citaĵoj plej ofte restas en la angla sen germana traduko. Tio estis la kutimo en eseoj dum miaj universitataj jaroj, sed por traduko en la internacian lingvon kaj por ĝenerala legantaro mi ne havis tiun avantaĝon uzi nur la anglan sen krei ribelon inter la esperantistaro.

Mi scivolas kion pensas la germanlingva leganto kiu ne scipovas la anglan kaj vidas tutan alineon

en tiu lingvo. Feliĉe la legantoj de la Esperanta traduko ne havos tiun problemon.

Tro ofte aperis anglalingva fivorto kiu perpleksigis la tradukanton. Se germanlingvano uzas anglan fivorton, ĉu li volas ŝoki aŭ nur montri sin laŭmoda; ĉu li scias en kiu socia tavolo tiu vorto estas uzata en anglalingva lando?

La tradukisto devas esti singarda kontraŭ vortoj pruntitaj el aliaj lingvoj. Ĉu ili havas la saman signifon kiel en la originala lingvo? Ĉu ili estas uzataj en la samaj cirkonstancoj? Dum lernado de fremda lingvo oni facile kaptas vorton sen scii al kiu lingva tavolo ĝi apartenas.

Detlef Karthaus estas la dua maldekstre

La angla vorto kiu plej ĝenis min estas samsignifa kun sekskuniĝo. Ĝi estas konata de ĉiuj sed, almenaŭ en mia generacio, uzata nur de la malelito, de la kanajlaro, de krimuloj kaj de nematuraj infanoj en la lerneja korto. Se iu alia uzas ĝin, tiu tuj aldonas ”Pardon my French” ĉar la nedireblan oni rajtas, laŭ tradicio, diri france.

La tabuo kontraŭ tiu vorto estas vaste disvastigita. Se iu gravulo perdinte sian sinregon uzas tiun vorton la amaskomunikiloj raportas: ”Li uzis vorton de kvar literoj”. Se en televida intervjuo la gasto uzas tiun vorton, oni aŭdas elektronikan pepon por superbrui la vorton.

Nu, kion fari? Mi unue pensis ke mi uzus esprimon kiun Zamenhof aprobus, eble “damne” aŭ “diable”. Sed mi ne estas tia, kia Thomas Bowdler, la angla editoro de familia eldono de Ŝekspiro, kiu forigis ĉiujn maldelikatajn esprimojn, tiel ke la teatraĵo povas esti legata en familia rondo.

Mi ne memoras kio obsedis min traserĉi germanan vortaron por vidi ĉu tiu ofenda vorto oficiale ekzistas en la germana. Ho ve! Ho fek! Ho fuck! Jen la vorto en la respektata Duden sed sub la kapvorto ”F-Wort”. Do mi kapitulacis kaj decidis trakti ĝin kiel internacian esprimon.

Unue aperis en *Libera Folio* (2023-10-17)

Trakure tra Torino

Raporteto pri la 108-a UK

Geoffrey Greatrex, prezidanto de KEA

Sendube legeblos plurloke, kiel kutime, aro da raportoj pri la kongreso (29-a julio – 5-a aŭgusto 2023). Mi prezentu nur kelkajn rimarkojn pri ĝi, sufiĉe hazardajn.

La kongresejo mem tre plaĉis, kaj relative abundis loĝeblecoj apudaj. Restoracioj, aliflanke, ne apudis – nu, ili samdistancis, kiel la loĝejoj, sed necesas finfine manĝi pli ofte ol dormi. Tamen, almenaŭ troviĝis kafejoj tuj antaŭ la politekniko, kie okazis la kongreso. Ĉiuj ĉambroj grandis kaj taŭgis, ankaŭ teknikaĵoj glate funkciis, almenaŭ dum la kunsidoj, kiujn mi ĉeestis. En la mezo troviĝis agrabla korto, kie babilis kaj ripozis kongresanoj, aŭ eĉ muzikumis kaj dancis. Grandaj eventoj okazis en adaptita antaŭa fabrikejo eble je dekminuta piediro for de la politekniko. La halo tie longis, sed ĉar ĉio troviĝis sur la sama nivelo, por la malantaŭuloj estis pli malfacile vidi la prezentaĵojn. La nivelo de la vesperaj artaĵoj ne atingis tiun de tiuj, kiujn ni ĝuis en Montrealo; aparte malsukcesis la itala vespero – tiel ŝajnis al mi (kaj miaj najbaroj) –, ĉar oni multon atendas de tiom riĉkultura lando, kiel Italio.

Abundis interesaj prelegoj tre variaj. Por mi, ekzemple, estis plezuro renkonti la poeton Abel Montagut, kiu prezentis sian *Poemo*-n *de Utnoa* dum aŭtora duonhoro, kiu okazis en la librovendejo, kiel kutime. Italaj fakuloj ludis

gravan rolon en prelegoj diverstemaj, ekz. pri la bunta lingva mapo de Italio kaj la dialektoj, kiuj estiĝis tra la jarcentoj, pri kiuj parolis profesoro Fabrizio Pennacchietti. Estis aparta plezuro por mi renkonti lin, ĉar ni laboras universitate pri proksimaj temoj rilate la Mezan Orienton en la antikva periodo. Ĉe ATEO-kunveno eblis aŭdi italan kontraŭ-superstiĉo-eminentulon, kiu parolis pri sia kariero en bona Esperanto. Humphrey Tonkin verve gvidis sesion pri "Kio farendas". Ĉe alia sesio Nicola Ruggiero diskutis preparatan leksikonon de la homera lingvo.

Konstante ariĝis homoj en la enirejo, kie troviĝis la kongresaj giĉetoj. Oni povus iom plendi pri la fakto, ke estis nur unu vico por ricevi siajn kongresaĵojn je la komenco (problemo, kiun oni ŝajne solvis en ĉiu alia kongreso!), sed aliflanke la volontuloj diligente laboris konstante. Evidentis bela budo de la afrikanoj, kiuj ĉeestis la kongreson, varbante partoprenantojn por la venonta UK en Aruŝo.

Substrekindas kiagrade Torino mem estas alloga urbo: la LKK vere bonege elektis la lokon. Ne abundis turistoj, kio agrabligis la tutan sperton. Eblis promeni tra la urbo, eniri kafejojn kaj muzeojn, sen premiĝi de homamasoj. La urbo ne nur belegas, sed posedas rimarkindajn kulturajn riĉaĵojn, ekz. grandan muzeon pri egiptia historio. Koincide en alia muzeo oni montris ekspozicion pri Bizancio, ĝuste mia fako. Mi do profitis la semajnon por esplori la kulturon (videblan, sed ankaŭ manĝeblan kaj trinkeblan) de Torino; kaj dum la ekskursa tago mi sendepende trajnis al Aosta, kie mi hazarde renkontis oficiale ekskursantajn samideanojn.

Konklude, tre bela evento, dum kiu, kiel kutime, mi ĝojis revidi geamikojn kaj ekkonis novajn, plurajn el Hispanio.

Montreala ombrelo utilis por varmsuna Torino

Oficiala foto de la Torina UK (foto: John Huang, Kanado)

La torina balo en la Reĝaj Ĝardenoj prezentis klasikaĵojn: JoMon kaj Kimon

La tablo por la UK en Tanzanio (2024) estis tre populara (foto: John Huang)

New Documentary: *Lingvo Obskura*

Brendan Keane

To preface this, I do not speak Esperanto, though I have known about the language for quite a while now and have been moderately interested in its existence as something existing on the periphery of global linguistic awareness. I was so moderately interested, in fact, that I decided to make a short documentary on the subject.

Ĵenja Amis, Joel Amis, Normand Fleury (la intervjuitoj) kaj Brendan Keane

Lingvo Obskura is a short documentary running about 13 minutes that offers a window into the world of Esperanto and serves as a broader exploration of the human desire to communicate, connect, and preserve the treasures of linguistic heritage. It covers a bit of the history of the language, insights into the language as it relates to popular culture, and the perspectives and experiences of people that are part of the Esperanto community.

Over the course of 2023, I interviewed many members of the Esperanto community in Canada, including Yevgeniya and Joel Amis, Normando Fleury, Jed Meltzer, Parker Glynn-Adey who appear in the documentary. I attended MeKaRo, also, over the course of filming this documentary, and was happy to meet many members of the Esperanto community at this event.

You who read this are likely a part of this world; you may have spoken Esperanto for decades, or perhaps you have just begun to learn it. I made this documentary for everyone, whether you are a part of this world or not. I will provide a link at the bottom of this article; please feel free to share it with your friends and family. The project does not yet offer subtitles in Esperanto, but this will be remedied in the near future.

At the beginning of the documentary, I use a

quote from Borges' *Library of Babel*: "You who read me–are you certain you understand my language?" Though evidently a non-sequitur, an evocative quote to kickstart the documentary, the universal library that Borges proposes in the Library of Babel ultimately aligns with the values of Esperanto as it exists today: it is a testament to the power of language and the unity it can bring, regardless of our individual backgrounds and experiences.

You can watch *Lingvo Obskura* on YouTube. Please feel free to reach out to me by email at brendan-keane@live.com if you want to ask any questions regarding the creation of this documentary, or for more information.

Nova Libro: “La Milita Vojo de Granda Urso”

Bruce Arthur (Reĝino, Saskaĉevano)

Nun oni povas legi en Esperanto libron pri grava kaj interesa okazo el la historio de Okcidenta Kanado: la Ribelo de 1885. La libro estas “La Milita Vojo de Granda Urso”, kiu estas traduko de libro verkita de William Bleasdell Cameron kaj tradukita en Esperanton fare de la verkinto de tiu ĉi teksto. Notu ke la verkisto, William Cameron, mem ĉeestis la okazojn kaj konis la partoprenantojn.



Oni ofte diras, ke la Ribelo de 1885 estis la lasta milito en Kanado. Ĉu vi kredas ke oni refaros la historion se oni ne lernos de ĝi? Kiom vi scias pri la Ribelo de 1885? Iuj scias pri la rolo de Louis Riel kaj lia popolo. Sed ĉi tiu libro temas pri la alia duono de la ribelo, tio estas la rolo de indianoj, precipe de la bando de ĉefo Granda Urso.

En 1885, William Bleasdell Cameron estis juna viro de Orienta Kanado, kiu tiam loĝis en la vilaĝeto Frog Lake, proksime al la nuna limo inter la provincoj Alberto kaj Saskaĉevano. Tiun jaron, la tendaro de la bando de Granda Urso estis apud Frog Lake, kaj Cameron konis ilin, ĉar li laboris kiel komercisto. Li parolis ilian lingvon (la kirisan) kaj li ofte parolis kun ili. (Li ofte citas vortojn kaj frazojn de la kirisa en la libro.)

Cameron klarigis, ke estis tempo de grandaj ŝanĝiĝoj en la vivo de la indianoj, kaj ke ili havis malmulte da manĝaĵoj. Kiam Riel estris sian ribelon, li petis al indianoj ribeli samtempe. Iuj militistoj de la bando (sed ne ĉefo Granda Urso) decidis fari tion. La unua etapo estis mortigi ĉiujn blankajn virojn en Frog Lake. Cameron iel evitis morton, ŝajne ĉefe pro hazardo, sed la sperto efikis al li psikologie. Dum la sekvaj du monatoj, li loĝis kun la bando. Estis bataloj. Cameron povis foriri kaj la indianoj rezignis. Poste li partoprenis la procesojn kiel atestanto.

En la komenco de la libro Cameron avertas, ke ĉi tiu historio ne estas bela. Ja temas pri masakro kaj militado. Sed ne la tuta libro estas tia. Cameron interesiĝis pri la kulturo de la kirisoj, kaj en la libro li verkis multe pri tio. Estas interesaj priskriboj pri la dancado, pri kiel ili movis la tendaron, eĉ pri amuzaj ludoj. Li priskribis ankaŭ kiel stepaj indianoj de malsamaj lingvoj povis komuniki per neŭtrala internacia lingvo. Ĉu per Esperanto? Ne, en 1885, nia lingvo ankoraŭ ne eldoniĝis. Ilia internacia lingvo estis ia gestlingvo.

Mi devas averti legantojn, ke la libro enhavas rasismajn komentojn. Mi ne defendas tiajn komentojn. Sed se oni rigardos preter la komentoj, oni verŝajne trovos, ke Cameron ŝajne havis miksitajn sentojn, sed ke li plejparte deziris justecon por ĉiuj kaj klopodis kompreni la vidpunktojn de ĉiuj.

Mi volas danki al Vaughn Seward kaj Don Reble en Edmontono, kiuj tajpis mian tradukon kaj faris la alian komputilan laboron. Sylvain Auclair en Montrealo provlegis kaj multe plibonigis ĝin. Bruce Crisp en Otavo helpis pri iuj aparte malfacilaj vortoj kaj frazoj. Li ankaŭ donis al mi informojn pri eldonistoj, el kiuj FEL akceptis eldoni la libron kiel bitlibron. Se vi interesigas, iru al retbutiko.be/eo/ero/mivo.

Ĉe l' Akvo de Forgeso: nova orgena verko



Ĉi-septembre publikiĝis nova orgena verko de Karen Beaumont, inspirita de la mallonga dramo “Ĉe l' Akvo de Forgeso” de famega verkistino el Oksfordo: Marjorie Boulton (unua premio de Belartaj Konkursoj de 1955). Temas pri la poezia rerakonto de la legendo de Orfeo kaj Eŭridiko.

Pri la traduko: ekstelu.info/boulton-akvo

Libron eblas aĉeti interalie ĉe Amazon.

Aŭskultu la orgenan verkon ĉi tie (2,5 min).

Ĉu vi sciis?..

Martin Morris, bibliotekisto de Libraro Ludoviko kaj la libraro de ESK

Lastatempe alvenis al la Libraro Ludovika granda juvelo... la preskaŭ plena kolekto de nia revuo Lumo ekde 1958! Ĝin akompanis ankaŭ kolekto de 'Alumeto' - nia antaŭa bulteneto. Multajn dankojn al Wally du Temple pro la multjara prizorgo de la kolekto, kaj pro la sendo. Estis tre agrable havi la ŝancon trafoliumi la kolekton, de kie estas tuj videble, ke en Kanado ni estas bonŝancaj havi grupon de aktivaj gesamideanoj. Mi do decidis, ke estus tre agrable dividi kun la nuna legantaro de *Lumo* kelkajn elstaraĵojn.

La esperanto-grupo de Tri-Riveroj antaŭ la strattabulo de la unua Esperanto-strato de Kanado.

Ĉu vi sciis, ke Kanado havas Esperanto-straton? Eble ne estos surprize al vi ke tiu strato troviĝas en Tririvero/Trois-Rivières, kie ni nun havas Esperanto-Domon. La marta-aprila numero de 1962 montras tre grandan grupon de Esperantistoj apud la stratŝildo de la 'rue de l'Espéranto', tiam preskaŭ finkonstruita. Kompreneble, ĝi ne estas la sola ZEO (Zamenhofa aŭ Esperanta Objekto) en Kanado, aŭ eĉ en Tririvero -- ekzistas ankaũ la tririvera 'parc de l'Espéranto', kaj en Montrealo la parko Albert Saint-Martin.

Li venis, li vidis, li aktivis! Sur la kovrilpaĝo de 'Alumeto' (de januaro 1983) ni vidas niajn karajn kolegojn, Normandon Fleury kaj Zdravka-n Metz,

Alumeto

INFORMBULTENO de KANADA ESPERANTO-ASOCIO
p.k. 518, stacio B, Montrealo, Kebekio, Kanado. H3B 3K3
numero 1 Januaro 1983

Ĉefa nuntempa tasko de la Kanada movado estas informadi la publikon pri la ekzisto kaj la uzeblecoj de la internacia lingvo Esperanto. Plifacilas tion bone fari kiam oni estas informita kiel aliuloj informadas. Sur-fote estas la novaj respondeculoj de la Landa Oficejo (L.O.) de KEA.
Ili mem muntis tiun ekspozicion, kolektante diversajn ricevitajn aŭ aĉetitajn esperantaĵojn. Ĉu vi lasttempe faris same? Por pli bone antaŭprepari vin, legu la interesan artikolon, paĝo:10
(Fotis: Noël Lepage, en Multetna Centro St-Louis, Montrealo.)

kiuj muntis verŝajne tre belan ekspozicion pri Esperanto en la Multetna Centro de Montrealo.

La pasintjara sukcesa UK en Montrealo memorigis al multaj pri la antaŭa UK sur kanada tero, tiu en Vankuvero de 1984. 'Alumeto' de majo 1983

ALUMETO

INFORMBULTENO DE KANADA ESPERANTO-ASOCIO
Pf: 518 stacio B, Montrealo, Kebekio, Kanado. H3B 3K3
Numero: 3. Majo 1983

La urbestro de Vankuvero, S-ro Michael Harcourt (centre), oficiale proklamas la Semajnon de Internacia Amikeco. Sur la foto estas ankaŭ videblaj S-roj Wally du Temple (maldekstre) prezidanto de LKK kaj Ted Woodruff sekretario.

pruvas, ke tio ne estis la limo de nia aktiveco en tiu urbo - jen ni vidas Wally-n du Temple kaj Ted-on Woodruff kun la tiama urbestro de Vankuvero. Verŝajne, 1983 estis tre aktiva jaro en la historio de KEA.

S-ro M.C. Butler skribas:"Mi gratulas pri la apero de Kanada Lumo...Mi jam bindigis la malnovan kanadan gazeton-"La Lumo".
(Tiu malnova "La Lumo" aperis en 1904 !)

Gratulas nin grandega figuro en la historio de Esperanto en Britio - Montagu C. Butler (famega leksikografo, muzikisto kaj esperantisto el Britio). 20-o da liaj verkoj troviĝas en nia katalogo.

Ne eblas rekte pruntepreni kajerojn en tiu kolekto de *Lumo*, tamen ja eblas peti skanaĵojn. Petu pliajn informojn de mi se tio interesas vin.

Fine, ne forgesu, ke la Libraro Ludovika estas VIA biblioteko. Kiel membro de KEA / ESK, vi havas aliron al la tuta kolekto (prunte aŭ skane). Ni eĉ pagos la kostojn de la sendado al via domo, vi nur pagas la resendon. Pliajn detalojn vi povas vidi ĉe biblioteko.ca/uzi. Unuafojaj pruntantoj eĉ ricevos 3d-printitan legosignon (www.biblioteko.ca/librara-legosigno/)! La Libraro regule ricevas freŝajn titolojn - inkluzive de la tre alloga "Kolekto de la UK 2022". La tuta katalogo estas konsultebla ĉe katalogo.biblioteko.ca.

Agrablan legadon!





Inter ni revenis al Halifakso

Bob Williamson, sekretario de KEA

Lastatempe Wally du Temple sendis al mi 22 numerojn de "Inter Ni", 3-paĝa gazeteto kiun mi helpis eldoni dum proksimume 22 jaroj al lokaj esperantistoj kaj multaj aliaj. Ekde majo 1986, la halifaksa grupeto sekvis la konsilon de nia tiama gvidanto, Harry Lewis, ke ni produktu lingve bonkvalitan informilon pri iu ajn temo interesa al ni. Tra la jaroj, la kvalito ĉiam pliboniĝis, aparte sub la gvidado de la kreive verkema kaj malavara Prof. D-ro Steĉjo Norvell. En 2007 li bindigis la unuajn 240 numerojn en 4 volumojn, kiujn li distribuis al ni kaj al kelkaj gravaj bibliotekoj kiel la Biblioteko Hodler, la Nacia Biblioteko de Aŭstrio en Vieno, kaj sia propra Libraro Ludovika. Bedaŭrinde, mi poste ne sufiĉe zorge kolektis kaj stokis ĉiujn sekvajn numerojn. Pro tio, mi multe dankas al Wally, ke li povis redoni al mi la plejparton de la mankantaj numeroj.

Parenteze, Wally ankaŭ sendis numeron de "La Torontano" (vintro 2006-2007) en kiu aperis nekrologo de Dez Hackett. Dankon, Wally!

“Kie estas la kanadanoj?”, aŭ: Pripensoj pri KVaK-6

Bob Williamson, sekretario de KEA

Mi iom pripensas la jam okazintan KVaK-6 (Kanada Virtuala Kongreseto n-ro 6, je la 18-a de novembro 2023). Kiel kutime, estis interesaj programeroj: raporto pri TAKE (Tut-Amerika Kongreso de Esperanto), kiu frue en novembro okazis en Fortalezo, Brazilo; "nekonata gasto" el 1941, kiu parolis pri siaj spertoj kiel Henri Ellenberger, fuĝanta el nazie okupita Francio. Estis muziko de mult-talenta kaj mult-flanka Jordan Zero; estis diskutoj kun brazilanoj, kiuj gastis en la Renkontiĝo Brazilo-Kanado (kiu okazis samtempe kun KVaK-6); estis raportoj de lokaj kluboj trans Kanado, subĉambraj babiladoj, kaj pli. Laŭ mi, KVaK-6 estis tre sukcesa kaj agrabla kunveno dum sabata posttagmezo. Kelkaj registraĵoj de la evento estas haveblaj en la [YouTube-kanalo de KEA.](#) Mi kore dankas al ĉiuj prezentistoj kaj partoprenintoj.



Tamen, mi iom maltrankviliĝis pro tio, ke multaj kanadanoj maltrafis ĝin. Mi antaŭvidis multe pli ol trideko da kanadaj ĉeestantoj, inter ili 7 estraranoj de KEA kaj pluraj de ESK. Ja estas pli ol 110 KEA-anoj kaj sufiĉe multaj ESK-anoj. Kie estis la ceteraj... ĉu en pli interesaj kunvenoj? Mi sincere demandas kaj volas scii. Ĉu mi troigis la esperojn? Evidente, ne ĉiuj povis ĉeesti dum sabata posttagmezo, sed ĉu estas pli oportuna momento, aŭ monato? Ekde la unua KVaK (novembro 2020) la nombro de ĉeestantoj iom-post-iom ŝrumpas. Kial? Ĉu vi ne ŝatas (aŭ

kapablas) aŭskulti Esperanton parolita en normala rapideco? Eble vi simple forgesis? Ĉu niaj programeroj ne allogas vin? Kion ni povas fari por interesi vin al nepra ĉeestado? Aŭ ĉu vi simple tediĝas de nia ŝerceta anaso kiu KVaKas? 😊 Ĉu ni daŭrigu nian kutimon de du transkanadaj kongresetoj ĉiujare? Kion vi individue opinias?

Pri alia afero, proksimume 20 brazilanoj ĉeestis tiun KVaKon pro tio, ke ĝi ankaŭ servis kiel la unua kanada versio de la ĉiumonata Renkontiĝo Brazilo-Kanado (RBK), iniciatita de brazilano Adonis Saliba kaj lia PMA (Programo Mia Amiko). RBK kutime okazos la unuan vendredon de ĉiu monato, krom la novembra kaj la decembra. Ĉu sufiĉe da vi kanadanoj ĉeestos tiujn kunvenojn? Ĉu estas kanadano/kebekiano, kiu helpos organizi la enhavon de tiuj kunvenoj gastigotaj de kanadanoj (en januaro, marto, ktp)? Bonvolu pripensi tion kaj anonci vin.

Mi sincere antaŭdankas pro ĉiuj viaj opinioj, sugestoj, konsiloj, kaj proponoj. Skribu al informo@esperanto.ca

Renkontiĝo Brazilo-Kanado

La tria Renkontiĝo Brazilo-Kanado havis iom pli ol dudeko da partoprenantoj (kun leĝere pli da brazilanoj ol kanadanoj). Adonis Saliba regalis nin per interesega enkonduka prelego pri Brazilo. La sekva Brazil-Kanada renkontiĝo okazos la **19-an de januaro, gastigota de Kanadanoj**. Metu nun sur vian kalendaron! Informoj sekvos.

“Mi laŭtlegis el taglibro ĉar mi ne povis memori ĉiujn miajn frazojn!”

Intervuo de Garry Evans al Revuo Orienta

Revuo Orienta (RO): Ĵenja Amis el Montrealo sendis al ni retmesaĝon, ke vi venos al Japanio. Sed ŝi ne malsekretigis, ke vi parolas ankaŭ la japanan! Kiel vi lernis la lingvon?

Garry Evans (GA): Fakte mia edzino estas japanino. Ni parolis tute japane dum certa tempo antaŭ 40 jaroj, kiam ni unuafoje renkontiĝis. Tiam mi estis studento en Kioto. Okaze de nia geedziĝo en 1985 mi estis 21-jara, ŝi 19-jara.

Mi estas brito, kaj naskiĝis en Canterbury, en suda parto de la lando. Sed mi ne plu loĝas tie de 25 jaroj. Mi unue loĝis en Tokio dum ses jaroj, poste en Honkongo dum 12 jaroj, kaj nun en Montrealo jam de sep jaroj.

RO: Mi spektis jutube la teatraĵon “1910”, kiun vi prezentis dum la 107-a Universala Kongreso (UK) en Montrealo lastjare. En ĝi vi ludas la rolon de William W. Mann. Vi ja faris bonegan aktoradon! Ĉu vi estas profesia aktoro?

intervjuo

“日記を読み上げたのは…セリフを覚えきれなかったから”

Garry Evans さん インタビュー

昨年の第 107 回世界エスペラント大会（モントリオール）で劇『1910』を熱演した人が来日する… そういう触れ込みで去る 2 月 15 日、われわれの前に現れたのは、日本語も流ちょうに話す英国紳士だった（本誌 4 月号 p.18）。日本語を勉強した動機から劇のこと、そしてエスペラント歴などを中心にお話をうかがった。（聞き手：白井 裕之）

実は妻が日本人なので…

–Ĵenja Amis el Montrealo sendis al ni retmesaĝon, ke vi venos al Japanio. Sed ŝi ne malsekretigis, ke vi parolas ankaŭ la japanan! Kiel vi lernis la lingvon?

Fakte mia edzino estas japanino. Ni parolis tute japane dum certa tempo antaŭ 40 jaroj, kiam ni unuafoje renkontiĝis. Tiam mi estis studento en Kioto. Okaze de nia geedziĝo en 1985 mi estis 21-jara, ŝi 19-jara.

Mi estas brito, kaj naskiĝis en Canterbury, en suda parto de la lando. Sed mi ne plu loĝas tie de 25 jaroj. Mi unue loĝis en Tokio dum ses jaroj, poste en Hongkongo dum 12 jaroj, kaj nun en Montrealo jam de sep jaroj.

–Mi spektis jutube la teatraĵon “1910”, kiun vi prezentis dum la 107-a Universala Kongreso (UK) en Montrealo lastjare.

Mann *(Vidu sube).* **Vi ja faris bonegan aktoradon! Ĉu vi estas profesia aktoro?**

Tute ne. Dum tiu prezentado estis iom da trukoj por maski amatorecon. Mi ofte laŭtlegis el taglibro ĉar mi ne povis memori ĉiujn miajn frazojn! Kaj respondante al la demandoj de la publiko, mi elektis demandantojn por ke mi ne ricevu ne atenditajn demandojn.

Garry Evans

–Kia estis la opinio de via edzino pri via aktorado?

Nu, efektive mia edzino ne parolas Esperanton... sed ŝi tre ŝatis, ke mi ludis

GA: Tute ne. Dum tiu prezentado estis iom da trukoj por maski amatorecon. Mi ofte laŭtlegis el taglibro ĉar mi ne povis memori ĉiujn miajn frazojn! Kaj respondante al la demandoj de la publiko, mi elektis demandantojn por ke mi ne ricevu ne atenditajn demandojn.

RO: Kia estis la opinio de via edzino pri via aktorado?

GA: Nu, efektive mia edzino ne parolas Esperanton... sed ŝi tre ŝatis, ke mi ludis la rolon de s-ro Mann. En 1910 li aĝis ĉirkaŭ 30 jarojn dum mi nun pli ol 60. Do mi devis malgrizigi al mi harojn kaj faris diversajn “similajn plijunigojn”. Rezulte ŝi diris: “aĥ, nun mi havas junan edzon!”

RO: Estas bone, ĉiukaze, ke ŝi aprezis vian

esperantan aktoradon. Kio estas via profesio, se ne aktoro?

GA: Profesie mi estas ekonomikisto ĉe privata kompanio. Mi donas konsilojn al investantoj. Fakte hodiaŭ mi iris al la Banko de Japanio por konsilado.

Tian rolon mi plenumas ankaŭ en la Esperanto-movado. Mi estas en la financa komisiono de UEA, kiu devas pensi i.a. pri la investo de du milionoj da eŭroj, kiun ĝi ricevos se la domo en Roterdamo sukcese vendiĝos.

Mi estas ankaŭ kasisto de la kebekia asocio.

RO: Kiam vi eklernis Esperanton?

GA: Esperanton mi renkontis jam junaĝe. Mi eĉ tralegis *Teach Yourself Esperanto*, sed post la finlego ne kontaktis esperantistojn. Pro tio mi forgesis preskaŭ ĉion.

RO: Kiel domaĝe. Kiel vi retrovis la lingvon, kiun vi forgesis?

GA: Mi retrovis ĝin antaŭ naŭ jaroj, kiam mi loĝis en Honkongo. Tiam Google-tradukilo komencis inkluzivi Esperanton en sian repertuaron, kaj eksciinte tion mi vizitis la Esperantan Vikipedion. Mi legis artikolojn tie kaj trovis, ke mi preskaŭ tute komprenas ilin! Sed en Honkongo mi ne sukcesis trovi esperantistojn.

RO: Oh, vi estis malbonŝanca en Hongkongo.

Garry Evans kun samideanoj en Tokio

GA: Jes, sed forlasinte Hongkongon mi restadis en Eŭropo dum kelka tempo. Mi tiam ĉeestis Esperanto-kursojn en Ĉeĥio, kaj ankaŭ vizitis la faman germanan Esperanto-urbon Herzberg.

Post kelkaj monatoj mi fariĝis kapabla paroli Esperanton, kaj ekloĝinte en Montrealo kontaktis Esperanto-asocion kaj trovis grupon da bonkoraj homoj: la jam menciita Ĵenja, Normando Fleury, kaj aliaj. Esperanto efektive estas neŭtrala lingvo en

Kanado, ĉar ĉe ni estas denaskaj parolantoj de la angla, de la franca, kaj de multaj aliaj lingvoj: ekzemple, la denaska lingvo de Ĵenja estas la rusa kaj la ukraina.

Mi tre ŝatas Esperanton kaj esperantujon. Dum la UK en Motrealo mi laboris kiel membro de LKK, kiel kasisto, kiel organizanto de la Movada Foiro kaj gvidis du ekskursojn. Mi sentis min kiel s-ro Mann ne havante eĉ tempon tagmanĝi!

RO: Ŝajne vi parolas pli da lingvoj, ĉu?

GA: Mi flue parolas la anglan, mia gepatra lingvo, kaj parolas ankaŭ Esperanton, la japanan kaj la francan.

Krome dum la pandemio mi eklernis la kimran lingvon ĉar ... mia avo estis kimro. Do ĝi estas por mi ava lingvo, kiun mi volis delonge lerni, kaj mi utiligis la okazon. Mi bone memoras, ke, kiam mi estis infano, mia avo rakontis al mi pri la persekutado al la kimroj fare de la angloj.

RO: Nu, vi antaŭe loĝis en Japanio, sed ankaŭ pli poste vi ofte venis al la lando por vizitoj, ĉu ne?

GA: Jes, ja estis tiel. Kun mia edzino mi kutime vizitis la landon dufoje jare. Sed dum la pandemio kompreneble ni tute ne povis veni. Tiu ĉi estas la unua vizito al Japanio post la pandemio.

RO: Kia estas via ĉi-foja plano? Kiajn lokojn vi vizitos?

Garry Evans kaj s-ino Kitagawa Ikuko

GA: Ĉi-foje ni estas en Azio jam dum semajno. Mi unue vizitis klientojn en Honkongo kaj Seulo, kaj antaŭ kvin tagoj alvenis al Tokio. Ĉi tie mi restadas parte por laboro, sed ankaŭ por feriado. Ĉi-semajnfine mi iros montogrimpi kaj planas kuri 50 kilometrojn sur la antikva pado de Kumano dum du tagoj. Do ne temas pri la tuta vojo. Mia hobio alia ol Esperanto estas kurado, precipe en montaro.

Pli poste ni vizitos la varman fonton en Yufuin en la suda insulego Kyushu. Mia edzino devenas de alia gubernio de la insulo, nome Miyazaki, kiun ni do ofte vizitas. Estas al mi tre kara memoro la

varma akcepto ricevita ĉe la Esperanto-klubo de Miyazaki en la somero de 2016.

RO: Mi deziras al vi agrablan vojaĝon! Kaj vi estos bonvena denove viziti nin kaj foje JEI eĉ volus ricevi de vi financajn konsilojn...

GA: Dankon, kaj mi certe estos je via dispono! Mi volonte servos al la bezono de la movado kie ajn en la mondo.

Unue aperis en Revuo Orienta (julio 2023). La intervjuo estas bazita sur la konversacio kun esperantistoj en Tokio, notita de la redaktoro de Revuo Orienta, s-ro Usui Hiroyuki. Legu pli pri la teatraĵo "1910" en la antaŭa numero de Lumo*.*
Sur la fotoj: *la unua apero de s-ro Mann antaŭ la publiko okazis en la apartamento de Garry Evans, dum la unua ĉeesta kunveno de la teatra teamo (aktoroj, verkinto, muzikistoj, helpantoj).*

Ekkonu aliajn esperantistojn en Ameriko!

Trefflé Mercier

La 2-an de decembro 2023, dum la lasta KEA-estrarkunsido de la jaro, la eliranta prezidanto Geoffrey Greatrex proponis al Trefleo Mercier ĉeesti la unuan Tutamerikan Parlamenton de Esperanto la 10-an de decembro per Zoom. Trefleo akceptis, eĉ ne sciante ĝuste pri kio temas tiu Parlamento. Li tion faris nome de la tuta kanada esperantistaro.

Kiam li konektiĝis per la Zoom-ligilo, li malkovris tri homojn sur la ekrano kun aliaj, kiuj provis konektiĝi. La unua duonhoro estis dediĉita al la solvo de teknikaj problemoj. Poste, oni ekvidis pliajn vizaĝojn sed ne multnombrajn. Ni malkovris, ke tiu Parlamento estis la iniciato de brazilano, Rubén Sánchez (Rubeno). Iom poste venis aliaj personoj: urugvajanino (la sola virino de tiu unua kunveno), vizitanto el Hungario, kaj du pliaj kanadanoj, Guy Matte el Otavo kaj John Huang el Toronto. Tri kanadanoj partoprenis tiun eventon. Neniu el Usono, Meksiko, Brazilo aŭ Kubo, kie la esperantistoj abundas. La kulpo sendube iras al la manko de reklamo.

Mi demandis al la gastiganto, Rubeno, kiu estas la celo de tia Parlamento. Li klarigis, ke la ideo venis dum la lasta Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en Fortalezo, Brazilo. Li konstatis, ke malmultaj eksterlandanoj ĉeestis tiun eventon pro la longaj distancoj en la tuta kontinento kaj pro la kostoj. Do, li demandis sin: “kial ne organizi virtualan tutamerikan renkontiĝon per Zoom?” Tiu evento povas okazi eĉ pli ofte ol TAKE. Estus okazo konatiĝi kun amerikanoj kaj libere babili. Tio kostus malpli ol organizi fizikan kongreson. Rubeno ankaŭ klarigis, ke oni ne bezonas prezidanton, nek sekretarion, nek kasiston, do malpli da burokrataĵoj. Li estus la kunordiganto, aparte rilate la Zoom-ligilon.

Ni poste pritraktis la frekvencon de tiuj kunvenoj. La unua ideo estis dufoje jare, sed kelkaj opiniis, ke tio ne sufiĉas. Trefleo proponis kvar fojojn jare: unu renkontiĝo per sezono, kaj la plimulto samopiniis. Pri la tago oni decidis fari tion iun dimanĉon. La horo: kiel la unua fojo: 20:00 UTC, alivorte 15:00 por centra Kanado, kiel Ontario kaj Kebekio.

La sekva Tutamerika Parlamento de Esperanto okazos la **17-an de marto 2024** je la 20-a horo UTC. La Zoom-ligilo ĉiam estos: us02web.zoom.us/j/86019702393; ID: **860 1970 2393**. Bonvenon al ĉiuj kanadanoj, kiuj ŝatus amikiĝi kun aliaj amerikaj esperantistoj!

Paralelaj Universoj (aŭgusto 2023)

Montrealanoj vizitis la novan turon urbocentre kaj readmiris la vidon al la belega Esperanto-urbo

Nia Esperanta flago fiere flirtis de la ikona halifaksa fortikaĵo

Paralelaj Universoj (aŭgusto 2023)

Sen krokodiloj, sed kun testudoj, kaj pluraj Esperanto-parolantaj infanoj, torontanoj amuziĝis

Mia matraco en Kanado

Maurice Labelle

Jen epizodo de la ĉiutaga vivo. Temas pri la tria ero de la sekvo “metroo, laboro, dormo”*. La metroon oni povus atendi eterne en mia eta kampara urbeto kun 1 200 homoj. Pri la laboro mi malpermesas min paroli, ĉar mia koramikino kaj mi nun profitas libertempan periodon kun Ludjo, nia adorata hundo.

De pli ol 10 jaroj mia koramikino kaj mi dormas sur malnova maldika matraco, mola kaj malbone remburita. Ĉar nia financa situacio pliboniĝas kaj niaj artikoj plimaljuniĝas, ni firme decidis akiri novan liton. Jes, jes, veran liton, duhoman, tute novan, somieron kaj matracon, tiel firman, kiel nia decido. Cetere, kiel bona antaŭzorgema paro, ni jam aĉetis en brokantejo ensemblon, kiu inkluzivas litkapon kaj litpiedon ornamitajn per beleta ŝablono de marketro. Mia koramikino, kiu ne povas spiri pli ol unu semajnon sen tuŝi penikon, poluris kaj retinkturis la ensemblon, redonante al ĝi ties originalan sendifektan brilon. La litkapo kaj litpiedo brilegas ekde tiam unu sur la alia, apogitaj sur la muro.

Sufiĉe da atendado! Mi iras urben ĉe La Reĝo de la Dormo, kie finfine mi realigas nian revon. Mi aĉetas la matracon kaj la somieron, kaj ricevas aldone, kompleze de S-ro Malavara**, la vendisto, fortikan kaj pezan metalan subtenaĵon, kiu, kunmetite, sin apogas sur kvar mojosaj globetoj, sed kiu nuntempe kuŝas en mil kaj unu disaj pecoj en granda kartona skatolo, sur kiu larĝa travidebla glubando iele-tiele ŝtopas maltrankviligajn ŝirojn. S-ro Malavara ĵuras, ke neniu ero mankas kaj plu laŭdas la unuarangan kvaliton de siaj varoj. Finfine, mi pagas kiel endas la prezon de dumvive garantiita komforto, kun impostoj pri dormo inkluzivitaj.

La bona S-ro Malavara helpas min meti la matracon kaj la somieron sur la tegmenton de mia subkompakta infanludilstila aŭto. Ĉar S-ro Malavara vere malavaras, li havigas al mi la ŝnuron, kiu utilas por alligi la tuton, kaj tuj hastas en la butikon, kie alia kliento atendas lin. Ekstere estas tridek du celsiaj gradoj sub nulo. La ŝnuro estas iomete maldika. Mi duobligos ĝin.

La pene gajnita sperto pro mia antaŭa skolteco helpis min. Kiom da teneraj memoraĵoj! Libera aero, eĉ en malvarma kaj malseka vetero, kaj la ĉampionadoj pri nodoj. Oni ne naskiĝas skolto; oni fariĝas skolto kaj restas tiel ĝis la fino de siaj tagoj. Mi denove devas defii miajn moralajn kaj fizikajn kvalitojn. Ĉiufoje, kiam mi tiras la ŝnuron de S-ro Malavara, ĝi tranĉetas miajn fingrojn kaj penetras ĝiajn fibrojn. La ĉirkaŭa aero, instigata de la norda vento, ne laciĝas mordi miajn vizaĝon kaj manojn. Kaj ju pli la tempo pasas, des pli ĝi persistas.



Baden-Powell fierus pri mi. Mi pensas, ke mi tre honore plenumis mian taskon. La matraco, la submatraco kaj la aŭto estas intime ligitaj. Malgraŭ ke mi klopode puŝas la matracon kaj la submatracon, nenio moviĝas, aŭ apenaŭ moviĝas. La daŭro de la testo estas mallongigita pro la intensa malvarmo. Ĉar la subkompakta aŭto konsiderinde ampleksiĝis, mi singarde ŝoforos. Cetere, mi havas bonajn kialojn kredi, ke ĝi pli reagos ol kutime al la ventopuŝoj.

Mi reiras enen por preni la metalan subtenaĵon. En la malantaŭo de la vendejo, S-ro Malavara ŝajnas esti finonta vendon. Sen interrompi la ardan konversacion, kiun li havas kun sia kliento, li indikas al mi per la pinto de la nazo, ke li postlasis la skatolon tute apud la enireja pordo. Mi atendas momenton antaŭ ol eliri. La brulsento de miaj fingroj iom post iom foriras. Nun temas nur pri malsevera piketado, samnatura kiel tiu, kiu trafas miajn vangojn, miajn orellobojn kaj miajn piedfingrojn. La periodo de ripozo finiĝis.

La metalaj pecoj, kiujn la skatolo enhavas, kunbatas unu la alian frakasbrue eĉ je la malplej granda movo. Tiu tro longa ujo rifuzas tute eniri en la malvastan internon de la aŭto. Sekve, necesas al mi malaltigi la pasaĝeran fenestron, por ellasi la troecon de la elstaranta elemento de mia kargo. Mi enlokiĝas ĉe la stirilo. Mi surmetas la gantojn, kiuj tiom kruele mankis al mi dum mi faradis nodojn antaŭ apenaŭ kelkaj minutoj. Startante, mi videtas tra la montrofenestro S-ron Malavaran kaj lian beatan klienton irantajn al la kaso. Ŝajnas al mi, ke mia koramikino kaj mi ne estos la solaj, kiuj bone dormos ĉi-nokton.

La revena veturado okazis sen tro da malfacileco.

La ŝnuro, la matraco, la submatraco, la hejtsistemo kaj la aŭto travivis. Mi renkontis neniun patrolon de trafika sekureco. Sen la stultulo, kiu longe kaj persiste sekvis min tro proksime, la vojo estintus bela. Eble li konsideris, ke mi ne veturas sufiĉe rapide kaj tial li konstante provis preterveturi min, eĉ en la plej danĝeraj areoj kaj malgraŭ la trafiko, kiu venis kontraŭdirekte. Aŭ eble ŝajnis al li, ke mi ne estas sufiĉe ŝarĝita kaj sekve li nepre volis alkroĉiĝi al mia bufro?

Estas komplike kompreni, kiel povas funkcii la cerbo de malsana orangutano, kiu videble malsukcesis je ĉiuj siaj lecionoj de baza civitismo kaj de bona ŝoforado, kaj kiu estas eĉ pli nervoza ol sia sporta aŭto. Dum trideko da kilometroj, mi diligente trudis al li dolorigan pacienc-kuracadon. Post longa distanco, mi fine dekretis la ekziston de la ideala spaco, kie mi povis flankiĝi por lasi lin preterpasi. Mi poste meditis pri la profunda senco de la frazo, atribuita al Woody Allen: "Danĝera ŝoforo estas tiu, kiu preterpasas vin malgraŭ ĉiuj viaj klopodoj por malebligi tion al li”.

Hejmo, dolĉa hejmo − kaj vivu afablaj kaj helpemaj najbaroj, kiel la mia. Tia najbaro, kiu ne hezitas unu sekundon veni helpi al vi endomigi matracon. Mia koramikino observas nin, ravita.

La dormoĉambro situas sur la dua etaĝo. Unue necesis volvi kaj malsuprenigi la malnovan, ebenan maldikan kaj molaĉan ruinaĵon, kiu ĝis tiam pretendis esti parto de la lito. Mi malestime manipulas ĝin. Ĝi neniam plu profitos de la nokto por malice plenigi al ni la korpon je muskoldoloroj. Hipokrita ŝajnmatraco, kiu kun sia banala ligna bazo brulos en la publika rubamasejo. La fumo, kiu eliros el ĝi, estos almenaŭ same nigra, kiel la tenebroj. Ĝis la nerevido, malbelega matracaĉo!

Kvaliton oni tuŝas kaj sentas, eĉ tra protekta pakumo el dika plasto. La matraco de S-ro Malavara, male al la antaŭa, ne kolapsas tuj kiam oni levas ĝin. Ĝi estas dezajnita por resti firma, kio ajn okazas. La submatraco, siaflanke, konsistas el ligna armaturo. Neniam ĝi fleksiĝos, eĉ je unu centimetro. Ni movas la meblojn por liberigi la pasejon. Kvalito regnu!

La petolema ĉarmo de modesta, preskaŭ jarcenta kampara domo ne facile akordiĝas kun la ampleksaj atributoj de moderna matraco, kiu enhavas la sciencan substancon de novaj teknologioj. La renkontiĝo inter la du epokoj, rivalaj pri kelkaj aferoj, montriĝas aparte malfacila ĉe la ŝtuparo.

Per la asistado de dua najbaro kaj post unu horo

de lacigega laboro, ni sukcesis pasigi la matracon tra ĝi. La pezo, la forto kaj la deciditeco de tri unuiĝintaj viroj ebligis tordi ĝin apenaŭ sufiĉe por atingi la celon. Sed ili ne sufiĉis por venki la nefleksebla reziston de la submatraco. Ŝajnis al ni, ke forigante la ŝtuparan apogrelon, ni gajnos la liberspacon, kiun ni bezonas. Bedaŭrinde, ne.

La rimedoj, kiujn tiu svaga strategio instigis nin adopti, konfirmas tion, kio estis divenebla unuavide: la plej granda fenestro de la dormoĉambro restas pli malgranda ol la submatraco. Unu post la alia ĉiu el niaj provoj mizere malsukcesas. Neniu el niaj ideoj estas farebla. La mirinde pragmata inteligenteco de mia koramikino estas neniel helpema. Kiu ajn estis la senco aŭ la angulo, en kiu ni metas ĝin, la submatraco ĉiam alkrociĝas al la samaj lokoj. Por pluenirado oni bezonus entrepreni verajn laborojn de malkonstruo. Post la elvoko de tiu neceso, mi decidas ĉion haltigi. La damaĝoj al la muro kaj la apogrelo jam estas grandegaj. Kiel ajn, la tempo de la tagmanĝo alproksimiĝas.

Ni devas suferi malvenkon. Ni remetas la meblojn kaj iomete reordigas ilin. Mia koramikino kaj mi dankas la najbarojn dezirante, ke nia senkuraĝa aspekto ne kredigu al ili dubojn pri la sincereco de nia dankemo.

La matraco estas supre, la submatraco estas sube. La lunlumo ne estas praktika. Funde malesperigite, mi resuprenigas la damnan malnovan matracon kaj reinstalas ĝin sur ĝian banalan lignan bazon. Mi kontemplas tiun ĉagrenan scenon. Tie ĉi kaj tie, kontraŭmure apogitaj kaj perfekte neutilaj, tute nova matraco, ankoraŭ pakita kaj, tiel bone pakita, longa fort-kartona skatolo, kiu enhavas, verŝajne, ĉiujn pecojn de la metala subtenaĵo - la globetan modelon, la pecojn de malmuntita apogrelo, litkapon kaj litpiedon frotpurigitajn kun amo bazita sur la espero — nun neniigita — je pli bonaj tagoj kaj noktoj. La ŝtuparo, sen apogrelo, fariĝas minaca. Granda muro portas la okulfrapajn

markojn de malgajnita batalo. La hundo paŭtas. Ekstere estas ŝtormo.

Mia koramikino kaj mi estas seniluziitaj. Ne estas problemo sen solvo, sed ni ankoraŭ ne trovis tion, kion ni serĉas. Ĉi-vespere ni lasos tion ĝis morgaŭ. Cetere, mi estas laca. Ni pensu pri alia afero kaj preparu la tagmanĝon.

Estis hieraŭ. Ĉi-matene, kiel ĉiuj matenoj ekde pli ol dek jaroj, mi leviĝis frue kaj muskoldolorite. Mi prenas kafon kaj atendas senpacience la horon de malfermo de la vendejoj. Tuj kiam la horo alvenas, mi telefonas al Reĝo de la Dormo. Kontraŭ la aldono de kelkaj krompagoj al la origina prezo, S-ro Malavara proponas fabrikigi duonigeblan submatracon kaj liverigi ĝin hejmen. La interkonsento estas farita. Mia koramikino ĵus vekiĝis. Mi antaŭĝojas anonci al ŝi la novaĵon.

Dek kvin centimetrojn da freŝa neĝo amasiĝis dum la nokto. Poste en la tago, ni iros skii, ĉar hodiaŭ la vetero estos bela.

Tradukita el la franca de Raymond Labelle kun la helpo de Guillaume Armide (Gijom) kaj Stéphane Brault. Dankegojn al Gijom kaj Stefano!

* metroo, laboro, dormo – de la franca esprimo “métro, boulot, dodo”, precize esprimas la rutinaĉon de la ĉiutaga vivo de laborantoj

** Noto de la tradukinto: en la originala franca teksto la aŭtoro uzis la vorton “Généreux”, kiu estas sufiĉe ofta familia nomo en Kanado kaj kiu laŭlitere tradukiĝas kiel “Malavara”.

Renkontiĝoj en Kanado

Montrealo kaj Kebekio: la dua kaj la lasta vendredo de la monato, 18:00, Resto Végo (foje okazas ankaŭ virtualaj kunvenoj, kontrolu rete)

Viktoria Kafejo de Esperanta Kulturo: ĉiusabate, 10:00

Halifaksa Videkunveno: dimanĉe, 11:00

Toronta Konversacio por Komencantoj: dimanĉe, 13:00

Alberta Kunvenu! marde, 19:00

Otavo Konversacia rondo tutmonda: la lasta ĵaŭdo monate, 19:00

Londono, Ontario: sabate je la 14-a horo

Vizitu Eventan Servon por ĉiuj detaloj!

https://eventaservo.org/

Tamen kantas fido de Clarence Bicknell

"Tamen kantas fido" estas nomo de libro de originala poemaro de Clarence Bicknell (kies kanton vi eble memoras el la teatraĵo 1910). Dum la UK en Torino estis lanĉita tiu ĉi libro, redaktita de Humphrey Tonkin kaj Michela Lipari. Ni proponas al la legantoj de Lumo etan guston de tiu libro (aĉeteblas de UEA).

ADIAŬ

Adiaŭ! La venteg' kruela
Blovadas dum la nokt' malhela,
Sed en la frumateno
La sun' brilante sur la teroj
Juvelojn faros el neĝeroj;

Adiaŭ! – sen ĉagreno.
Adiaŭ! El la pluvolarmoj
Naskiĝos la printempaj ĉarmoj,
Kaj, apud la rivero,
Ni vidos milojn da floretoj,
Ni aŭdos kantojn de birdetoj;

Adiaŭ! – kun espero.
Adiaŭ! Raŭpoj kaj folioj
Ŝanĝiĝos; oraj papilioj
La rozojn karesados!
Rikolto la semadon kronos;
Premion pacienco donos;
Adiaŭ! – ni amados.



Tiu poemo aperis en marto 1919 en Esperanto Monthly, vol. 7, n-ro 75, p. 29 – gazeto kiu jam la antaŭan septembron aperigis nekrologon de Clarence, kiu mortis la 17-an de julio 1918. Ĝin akompanas anonco pri starigo de komitato en Bordighera cele al monkolekto honore al la poeto por fondi kuracan servon por la malriĉuloj de Bordighera (la urbo kie loĝis Bicknell) kaj por fonduso favore al la Hospitalo de Sankta Jozefo por malriĉaj maljunuloj, en kies komitato membris Clarence Bicknell ekde ĝia fondiĝo. Oni estis petata sendi donacojn al la brita vickonsulo, s-ro A. E. Turton.

Kanada Esperanto-Asocio

La estraranoj de KEA dum 2024–2025:

- Prezidanto: Garry Evans — Montrealo QC
- Vic-prezidanto: Geoffrey Greatrex — Otavo ON
- Kasisto: Raymond Brisebois — Londono ON
- Sekretario: Bob Williamson — Halifakso NS
- Redaktoro: Ĵenja Amis — Montrealo QC
- Estrarano: Andrew (Andreo) Sly — Viktorio BK
- Estrarano: Luis Obando – Toronto ON
- Estrarano: Trefleo Mercier – Ŝerbruko QC
- Estrarano: Jordan Zero – Barrie ON

Adreso:

110 Grand Ave. 414, London, Ontario, N6C 1L8, Kanado

Retejo: https://esperanto.ca/

Facebook: facebook.com/KanadaEsperantoAsocio

YouTube: youtube.com/channel/UCVBXZyk2N436ot4qIug-2ng

Esperanto-Societo Kebekia

La estraranoj de ESK dum 2024–2025:

- Prezidanto: Nicolas Viau
- Vic-prezidanto: Joel Amis
- Kasisto: Garry Evans
- Sekretario: Sylvain Auclair
- Estrarano: Normand Fleury
- Estrarano: Gabriel Labrie
- Estrarano: Eveline Ménard

Adreso:

Société québécoise d'espéranto

6595 rue Briand, Montréal (Québec) H4E 3L4, Kanado

Retejo: http://www.esperanto.qc.ca/

Facebook: https://www.facebook.com/EsperantoQuebec

Lumo

Redaktoro: Ĵenja Amis. **Provlegistoj kaj helpantoj:** Bob Williamson, Francisko Lorrain, Sylvain Auclair.

Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi : www.pasportaservo.org.

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.